

V-18673 Esperanto

JARLIBRO

A vertical barcode consisting of several parallel lines of varying thicknesses, used for library identification.

1949

DUA
PARTO

UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO

JARLIBRO

de la Universala
Esperanto-Asocio

1949

DUA PARTO

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne
povas esti represata, ĉu tute, ĉu
parte, sen la permeso de U.E.A.

Copyright by Universala Esperanto-Asocio
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Telefono: Chorley Wood 138

NUR POR UZO DE MEMBROJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

Prof. MIECZ. SYGNARSKI

Ex Libris

L. 138/15

INFORMOJ POR VI

Denove venas al vi la dua parto de la jarlibro kun la kutimaj informoj pri aldonoj kaj ŝanĝoj kaj kun nova fak-terminaro *Marista*. Notu, ke tiu lasta estas tro longa por unu eldono de la jarlibro kaj tial ni nun publikigas la unuan parton. La dua aperos en la jarlibro 1950. En la nuna jarlibro troviĝas tute nova ero—Raporto de nia Estraro. Legu ĝin, ĝi estas interesa. Se ĝi trafos ĝeneralan aprobon simila raporto aperos ĉiujare.

Tio tamen dependas de vi. Ni ĉiam klopodas plibonigi niajn eldonaĵojn, sed povas tion efektiviĝi nur se ni ricevas la subtenon de la Esperantistoj. U.E.A. estas la sola internacia organizaĵo, kiu laboras **nur por Esperanto**. Ĝi ne havas flankajn interesojn; ĝia sola celo estas pliprogresigi la tutan Esperanto-movadon kaj proksimigi la tempon, kiam la tuta mondo uzos Esperanton. Sekve ĝi indas la subtenon de ĉiu Esperantisto, kia ajn estu lia privata—ekster Esperanto—intereso. Necesas, ke vi subtenu nin ne nur per via pŕsona aliĝo, sed ankaŭ per la varbado de viaj Esperantistaj amikoj, el kiuj multaj certe aliĝus al U.E.A. se iu atentigus ilin pri la dezirinda kaj pri la avantaĝoj de tio. La kotizo fakte estas bagatelo; homo ofte elspezas pli je unu fojo por la propra amuzo.

Lastatempe okazis multaj ŝanĝoj en la kurzoj kun sekvaj ŝanĝoj en kotizoj en kelkaj landoj. Detaloj troviĝas sur paĝo 6. Ni insiste petas, ke vi pagu vian kotizon kiel eble plej frue. Tio tre helpas al ni taksii la eldonkvanton de la gazeto kaj jarlibro, kaj evitigas la malagrablaĵon, ke kiam oni pagas malfrue, iu numero eble jam estas tute elĉerpita.

Malgraŭ la kurzoŝanĝoj, malgraŭ la fakto, ke jam pasis preskaŭ kvin jaroj post la militfino, ankoraŭ restas multaj landoj el kiuj oni tute ne povas fari al ni pagojn. En tuta aro da landoj ni povas akcepti membrojn nur per diversaj interŝanĝ-aranĝoj, kiuj tre komplikas nian administradon, sed ni nuntempe ne povas ion fari por ebligi aliĝon de membroj en Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo kaj Japanujo. En tiuj landoj ni povas akcepti aliĝojn nur se iu en pago-kapabla lando volos pagi la kotizon. Ni denove tre petas tiujn, kiuj povas tiel pruvi la solidaron de nia movado, pagi la kotizon de amikoj en la cititaj landoj, aŭ sendi al ni kotizon kun la indiko, ke ni elektu la “adoptoton.” Bonvolu noti, ke samideanoj en Aŭstrujo, Germanujo, kaj Hispanujo povas nun mem pagi sian kotizon en la propra lando.

Jarlibro 1950. Ni esperas eldoni ĉi tiun pli frue en la jaro kaj ni volas atentigi, ke ni devas ricevi tekstojn (kaj pagon) por reklamoj antaŭ la 15-a de januaro. Ni tre petas, ke membroj helpu al nia afero per la akiro de reklamoj. Ju pli multe de tia subteno ni ricevas, des pli granda kaj interesa povas esti la jarlibro.

Unu el la plej interesaj libroj en Esperanto estas

SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

ENHAVO

Enkonduko *Rektoro Karl Söderberg, Svedujo*

La laponoj kiel kultura popolo
Profesoro B. Collinder

La kimraj artofestoj - - *R. Rosetti*

El la mirinda naturo - *C. Stöp-Bowitz*

Astronomiaj sensacioj - *Profesoro K. Lundmark*

Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia
juro - - *Profesoro D-ro Ivo Lapenna*

El la fronto kontraŭ la malamikoj
de la kulturplantoj - *D-ro P. Neergaard*

La kalevala kulturo - - *Vilho Setälä*

Pri la sveda kooperativa movado
Rektoro S. A. Stahre

Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro
F. Szilágyi

**La libro enhavas la tekston de la prelegoj
en Malmö**

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.
(17 respondkuponoj)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIÓ
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

U.E.A. KOTIZOJ 1950

Klarigo de la tabelo sur la sekvanta paĝo

MJ (Membro kun Jarlibro) ricevas membrokarton, servokuponaron, kaj la jarlibron (Unua Parto printempe; Dua Parto aŭtune).

MA (Membro-Abonanto) ricevas membrokarton, servokuponaron, la jarlibron kaj la oficialan gazeton *Esperanto*.

MS (Membro-Subtenanto) ricevas membrokarton, servokuponaron, la jarlibron, kaj la oficialan gazeton *Esperanto*. Li afable pagas pli altan kotizon por helpi al U.E.A. finance.

Patr. (Patrono) ricevas membrokarton, servokuponaron, la jarlibron, kaj la oficialan gazeton *Esperanto*. Li bonvole pagas la dekoblan MA-kotizon por helpi al pli efika laboro internacia.

Jarl. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la prezon de tutpaĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa aŭ kvaronpaĝa (pli malgranda ne akceptata) reklamo kostas proporcie. La teksto de la reklamo kaj la pago devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue la 15an de Januaro por la unua parto, kaj la 15an de Aŭgusto por la dua parto.

Esp. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la koston de aparta abono al *Esperanto* por la tuta jaro.

Oni povas pagi kotizojn al la pagejoj indikitaj, aŭ al la Centra Oficejo :

Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

KOTIZOJ 1950

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Esp.	Valuto
Argentino ..	6	15	30	150	100	10	pesoj
Aŭstralio ..	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Aŭstrujo ..	8	18	36	180	120	12	sch.
Belgujo ..	35	90	180	900	600	60	fr.
Brazilo ..	15	40	75	400	220	30	kru.
Britujo ..	15*	22/6*	35*	135*	80	8	ŝil.
Bulgarujo ..	—	750	—	—	—	—	levoj.
Danujo ..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Finnlando ..	180	420	—	—	—	—	fmk.
Franco ..	250	625	1250	6200	4000	425	fr.
Germanujo ..	4	10	20	100	60	7	mk.
Hispanujo	20	50	100	500	320	35	pes.
Hungarujo ..	8	20	40	200	128	14	for.
Irlando ..	5	12/6	25	125	80	8	ŝil.
Islando ..	6.50	16	32	160	105	10	kr.
Italujo ..	500	1250	2500	12500	8000	800	liroj
Izraelo ..	250	625	1250	6250	4000	400	m.
Kanado ..	1	2.50	5	25	15	2	dol.
Nederlando	2.75	6.75	13.50	67.50	44	4.50	fl.
Norvegujo ..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Nov-Zelando	5	12/6	25	125	80	8	ŝil.
Polujo ..	300	750	1500	7500	4800	500	zl.
Portugalujo	20	50	100	500	320	35	esk.
Sud-Afriko ..	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Svedujo ..	4	10	20	100	60	7	kr.
Svisujo ..	3.50	8	16	80	50	5	fr.
Urugvajo ..	2	4.50	9	45	30	3	pes.
Usono ..	1	2.50	5	25	12	2	dol.
Aliaj landoj	5	12.50	25	125	80	8	angl. ŝil.

*enhavas la kotizon al B.E.A.

PAGU LA KOTIZON AL

- E. Inglesias Nunez, Dehesa 1860, Buenos Aires.
 L. E. Pfahl, 37 Seymour Street, Croydon, N.S.W.
 F. Höfert, Penzingerstr. 121, Wien XIV/89.
 G. Van den Bossche, Oostenstr. 26, Antwerpen. Pĉk. 4109.91.
 F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge. Pĉk. 4161.35.
 Brazila Ligo Esperantista, Praca da Republica 54, Rio de Janeiro.
 Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W.11.
 Bulgara Esperantista Asocio, Str. Tri Uŝi 15, Sofia.
 L. Jakobsen, Carit Etlarsvej 14, Aabyhøj.
 Joel Vilkki, Somero. Pĉk. 60253.
 Union Espérantiste Français, 34 Rue de Chabrol, Paris 10. Pĉk. 855-35.
 Brita zono : O. Bünemann, Isestr. 79-III, Hamburg 13. Pĉk. Hamburg 318-23.
 Usona zono : F. Helfers, Postschiessfach 165, Karlsruhe. Pĉk. Karlsruhe 24506.
 D. Dalmau, Roger de Lauria 98, Barcelona.
 P. Balkanyi, Budapest 54, Nemzeti Bank, Pézsforgó.
 L. O'hUiginn, Bothar Glasárd 16, Dublin.
 Federacio de Islandaj Esperantistoj, Poŝtkesto 1081, Reykjavik.
 L. Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma.
 P. Lachowitzky, Kerem Quar, Jerusalem.
 Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.
 P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag. Pĉk. 79167.
 R. Rian, Box 178, Trondheim.
 Brendon Clark, Leigh, N. Auckland.
 R. Sakowicz, ul Parafialna 3, Nowa Sól.
 J. de Saldanha Carreira, Av. Grao Vasco 33, r/c., Benfica-Lisboa.
 D-ro S. Liebeck, P.O.B. 2721, Cape Town.
 E. Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Poŝtgiro 44381.
 O. Walder, Eigenheim, Romanshorn. Pĉk. VIII 12139.
 D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida).
 Donald E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, Cal.
 Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.

ALDONOJ KAJ ŜANĜOJ

POST APERO DE LA UNUA PARTO DE LA JARLIBRO 1949

KOMITATO

Aldonu :

E. Bugajski, Zabkowska 38 m. 14, Warszawa, Polujo.
I. Dratwer, Jagiellowska 27/23, Warszawa, Polujo.
D-ro T. Van Gindertaelen, Leopoldstr. 99, Mechelen,
Belgujo.
F-ino N. Gropuzzo, Harambašićeva 19, Zagreb, Jugo-
slavujo.

Adressaĝo :

O. Lange, Vestergade 51, Odense, Danujo.

LANDAJ ASOCIOJ

1. Aliĝantaj al U.E.A.

Aldonu :

Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5, Zagreb, Jugo-
slavujo.
Slovenia Esperanto-Ligo, Cankarjevo Nabrežje 7/1,
Ljubljana, Jugoslavujo.

2. Ne-aliĝintaj al U.E.A.

Aldonu :

Germana Esperanto-Asocio, Engelbertstr. 7, (13b) Mün-
chen-Pasing, Germanujo.

ANGOLO

Lobito (Benguela). 4,000.

D : J. Alves Marques, notaria helpisto, Caixa Postal
211.

ARGENTINO

Bahía Blanca. D : vakas.

Bella Vista. D : vakas.

Buenos Aires. *

FD (Homeopatio) : J. A. Quiña González, kuracisto,
Str. Uruguay 714. Tel. : 41-1081.

FD (Jurnalismo) : T. Sekelj, ĵurnalisto, Gascón 75,
4-I. Tel. : 62-0583.

FD (Katolikismo) : vakas.

FD (Radiotelegrafio) : Tel. : 64-4306.

Curuzú Cuatiá (Corrientes).

D : Bruno Ostropolski, Rom-katolika sacerdoto, Casa
Parroquial.

Marcos Juarez. VD : nova adreso : Saenz Peña 981.

AŬSTRUJO

Felixdorf/Südbahn (Wr. Neūstadt). 2,500.

D : J. Schwartz, ekspedejestro, Bräunlichstrasse 12.

Innsbruck. D : vakas.

FD (Literaturo) : H. Königstedt, studento, Salurner
Str. 2-III.

Kitzbühel (Tirol). 8,000.

D : F-ino M. L. Planck, oficistino, Hinterstadt 32-II.
FD (Katolikismo) : La D.

Klagenfurt.

D : K. Dürschmid, librokomercisto, Hoffmanngasse
4.

Knittelfeld.

VD : R. Pawlik, eks-fervoĵisto, Stubalpenstrasse 33.

Wien.

FD (Gazetaro) : G. Katzianka, gazeteldonisto, Ros-
sauerlande 27/4, Wien IX. Tel. : A12-4-44.

Wörschach (Stirio). 1,100.

D : D-ro Ludwig Kaspar, eks-ĉefjuĝisto.

BELGUJO

Assebroek. D : vakas.

Charleroi.

VD : P. Paulus, oficisto, 60 rue du Grand-Central.
Tel. : 19517.

FD (Sociaj leĝoj) : La VD.

Gent. D kaj FD (Scienca literaturo) : nova adreso :
178 Peter Benoitlaan.

Liège. D : nova adreso : Quai de l'Ourthe 26.

Oostduinkerke. D : vakas.

Tongeren. D : vakas.

BRAZILO

Florianópolis. D kaj FD (Statistiko) : nova adreso :
Caixa Postal 377.

Petrópolis. D : vakas.

Pôrto Alegre.

VD : A. Flores, ŝtatoficisto, Rua Guilherme Alves 1617.
Tel. : 3.19.95.

FD (Filatelo) : B.C. Camozato, dentisto, "Edifício
Caicara" Ap. 21. Tel. : 9-1530.

FD (Kuracado) : D-ro J. Correa de Barros, kuracisto,
Escola Preparatória. Tel. : 32902.

São Paulo. VD : vakas.

FD (Bibliotekoj) : F-ino A. Levy, bibliotekistino,
Caixa Postal 5888.

FD (Ludilo-industrio) : nova adreso : Rua Rui
Barbosa 97, ap. 9.

BRITUJO

Bathgate (W. Lothian). D : nova adreso : Boghead
House.

Birmingham.

D : F-ino A. Waite, lernejestrino, 13 Vernon Road,
Birmingham 16.

VD : F-ino E. Wheatley, instruistino, 57 Wolver-
hampton Road, Birmingham 32.

Blackburn. D : vakas.

Danbury (Essex). FD (Budhismo) : B. E. S. Ander-
son, maŝinskribisto, "Aberdeen," Maldon Road.
Tel. : 393.

BRITUJO

Godshill (Insulo Wight). 1,300.

D : H. O. Mason, pastro, Godshill, Isle of Wight.

Harpenden (Hertfordshire).

D : W. H. Coventry, ĉefkomizo, 4 Douglas Road.

FD (Komerco) : La D.

Haverfordwest (Pembrokeshire). 7,500.

D : W. J. Nesbitt, instruisto, 14 Hill Street.

Largs. D : vakas.

Leeds.

FD (Socikredito) : W. Townend, instruisto, 125
Church Lane, Leeds 6. Tel. : 53553.

Letchworth.

FD (Edukado) : Russell Scott, eksinstruisto, Wilbury
Crest. Tel. : 332.

London.

VD : N.W.1. S-ino H. Stevens, ĵurnalistino, 25
Chalcot Square, Regents Park. Tel. : PRImrose
6200.

VD : N.W.2. J. Farrand, ŝtatoficisto, 58 Westbere
Road. Tel. : HAMpstead 8174.

FD (Blindulaj aferoj) : nova adreso : 49 Laleham Road,
Shepperton, Middx.

FD (Doganaj kaj akcizaj aferoj) : R. Abram, doganisto,
BM/CXXH.

FD (Kremacio) : nova adreso : 62 Winchester St., S.W.1.
FD (Ŝako) : vakas.

Luton. D : nova adreso : 120 Wilsden Avenue.

Manchester. FD (Telefonio) : nova adreso : 13 High
Bank Drive, Manchester 20.

Newquay. D : nova adreso : 29 Well Way, Porth.

Nottingham. FD (Junulgastejoj) : vakas.

Oxford. FD (Bahaismo) : vakas.

Southampton.

FD (Skoltismo) : G. Rust, instruisto, 122 Shirley
Avenue.

Stafford (Staffordshire). 30,000.

D : E. Shaw, oficisto, 25 Craddock Road, Holmcroft
Estate.

Stratford-on-Avon. D : vakas.

BRITUJO

- Upminster.** D : vakas.
Ventnor. FD (Skoltismo) : vakas.
Wallington. FD (Filozofio) : vakas.
Watford. D kaj FD (Komerco) : vakas.
Westgate-on-Sea (Kent). 4,500.
D : J. Collier, gastejestro, 7 Ethelbert Terrace.

BULGARUJO

- Popov :** la nomo de la urbo estas Popovo.
Sofia.
FD (Vegetarismo) : I. H. Krestanov, publicisto,
str. 6 Septemvri 2.

ĈEĤOSLOVAKUJO

- Praha.**
FD (Ekonomio) : D-ro M. Weirich, studĉefo, Ke
Koulce 3, Praha XVI.
Uherské Hradiště (Moravia). 7,000.
D : F-ino R. Vilémová, komercistino, Uherské Hradiště
—Sanita.

DANUJO

- Aalborg.** FD (Virinaj aferoj) : vakas.
København. FD (Martinus-instruado; Filozofio) :
vakas.
Kolding.
FD (Buterfarado) : J. Lunding, laktisto, Søgade 35.
FD (Ĝardenkulturo) : H. Hansen, ĝardenisto, gl.
Kongevej 19.
FD (Junularo) : nova adreso : Haderslevvej 56.
Lynby.
FD (Martinus-instruado) : M. Munch, civilinĝeniero,
Sjaellandsvej 28.
Odense. D. kaj FD (Komerco) : nova adreso : Vester-
gade 51.
Valby. D : vakas.

EGIPTUJO

- Cairo.**
FD (Filozofio) : J. Sabbah, oficisto, 1 rue Amir
Kadadar, Midan Ismailia. Tel. : 54745.
Giza. D. kaj FD (Spiritismo) : nova adreso : P.K. 350,
Cairo.

FINNLANDO

- Hämeenlinna.** FD (Medicino) : vakas.
Karjalohja (Uudenmaanlääni).
D : Aarre Kunelius, instruisto, Lehtola.
Koijärvi (Hämeen lääni). 3,500.
D : Juhani Kiviluoto, instruisto, Kojo, kansakoulu.
Tel. : 5.
Outokumpu (Kuopion lääni). 4,500.
FD (Medicino) : D-ro L. I. Lappi, kuracisto. Tel. :
231.
Pori. VD kaj FD (Teozofio) : nova adreso : Poste
Restante.

FRANCUJO

- Arles-sur-Rhone (Bouches-du-Rhône).** 35,000.
D : E. Borel, eks-radiostaciestro, Villa de l'Etoile,
ave. Victor Hugo. Tel. : 726.
Boulogne-Billancourt. D : nova adreso : 43 bis Rue
de Billancourt.
Cannes (Alpes Maritimes). 50,000.
D : C. Cresp, 14 rue du Dr. Pierre Gazagnaire.
Tel. : 91463.
Mâcon. D : vakas.
Malo-les-Bains. FD (Hoteloj) : nova adreso : Boite
Postale 5.
Moulins (Allier). 24,000.
D : D. Chagnoux, ŝtatoficisto, 12 rue Rosa Bonheur,
Yzeure (Allier). Tel. : Moulins 415.
Mouvaux. D : vakas.
Paris. FD (Hebreaj aferoj) : vakas.
FD (Komerco) : vakas.

FRANCUJO

Romans (Drôme).

FD (Fotografio): R. Mazade, desegnisto, 27 rue Armillerie.

Saint-Donat (Drôme). 2,500.

D: M. Dupuy, mekanikisto, avenue Georges Bert. Tel.: 68.

Saint Florentin. D: vakas.

St. Pourcain-sur-Sioule (Allier). 6,000.

D: L. Courtinat, poŝtestro, 9 rue Séguier. Tel.: 198.

Sin-le-Noble. D: nova adreso: 32 rue Jules Guesde.

Thiers (Puy-de-Dôme). 15,000.

D: M. Dessapt, teknika helpprofesoro, 16 rue Grenette.
VD: B. Gonon, komercvojaĝisto, 31 rue du Docteur Zamenhof.

Tourcoing (Nord).

VD: G. R. Gousseau, bankoficisto, 77 rue Cuvier.

Yzeure (Allier). 8,000.

D: D. Chagnoux, ŝtaticisto, 12 rue Rosa Bonheur. Tel.: Moulins 415.

GERMANUJO

Bad Aibling (Oberbayern). 8,500.

D: R. Hauber, notarieja oficisto, Frühlingstr. 2. Tel.: 70.

Bad Pyrmont (Niedersachsen). 18,600.

D: A. Strauch, eksinspektoro, Zimmermannster. 9, (21a) Bad Pyrmont.
FD (Katolikismo): La D.

Berlin.

VD: W. Gieseler-Fischer, ĉefinspektoro, Forstweg 79, Berlin-Frohnau.

FD (Fotografio): adreso: Foto-Gross, Tulpenstr. 7, Berlin-Lichterfelde-W.

FD (Turismo): W. Gieseler-Fischer, Forstweg 79, Berlin-Frohnau.

Braunschweig (Niedersachsen). 200,000.

D: F-ino K. Jahns, Zeppelinstr. 7.

Erlangen (Bayern). 50,000.

D: A. Starke, aktoro, Spardorferstr. 70.

GERMANUJO

Gelsenkirchen (Westfalen). 270,000.

D: H. Böcker, inspektoro, Westerholter Str. 85, (21a) Gelsenkirchen-Buer I. Tel.: 302 41.

Hannover.

D: E. Grund, komercisto, Podbielskistr. 4, (20a) Hannover-N. Tel.: 63226.

FD (Komerco): S-ino L. Zisseler-Harleb, Wunstorfer Landstrasse 1, Ahlem üb. Hannover.

Oberstdorf (Bayern). 10,000.

D: H. Wagner, instruisto, Prinzenstr., Hs. Edelraute, (13b) Oberstdorf i. Allgäu.

Barcelona.

HISPANUJO

FD (Denttekniko): R. de Luna Martí, dentteknikisto, Paseo de Colón, 5-1-2. Tel.: 10393.

Manresa. VD: vakas.

Olesa de Montserrat (Barcelona). 6,000.

D: A. Servet Martí, fervoj-staciestro, Estación F.F.C.C. Catalanes, La Puda de Montserrat (por Olesa).

Tarrasa.

VD: V. Garcia, teksisto, Calle Valle 5.

Valencia. FD (Kuracado): F. Poveda, kuracisto, Ribera 14. Tel.: 17694.

HUNGARUJO

Ĉefdelegito: P. Balkanyi, Budapeŝt 54, Nemzeti Bank, Pénzforg O.

Abony. D: nova adreso: Köztársaság u.9.

Belápatfalva (Héves-megye). 2,500.

FD (Religio): Pastro B. M. Koppány, r.k. sacerdot.

Budapest. FD (Elektraĵoj): vakas.

FD (Sindikataĵ aferoj): L. Márton, ministra referanto, X, Bánya-u. 2.

Györ. FD (Filmoj): La D.

FD (Lingvoj): vakas.

Nyiregyháza. D: vakas.

Pécs. D: vakas.

Szendrő. D: vakas.

Vencselő. (RD Feligio): vakas.

ISLANDO

Hornafjörður. (A-Skaftafellss.). 900.
D : Hallgrímur Saemundsson, instruisto, Höfn.

Vestmannaeyjar. 3,600.
D : H. Guðnason, laboristo, Fífilgötu 5.

ITALUJO

Bologna. FD (Abelkulturo) : La D.

Padova. FD (Instruado) : vakas.

Varese.

FD (Naturscienco) : M. Simondetti, inĝeniero, via
Staurengi 24. Tel. : 35.80.

Verona. FD (Katolikismo) : La D.

IZRAELO

Beer-Jaakov. 120.

FD (Vegetarismo) : Jehezkel Dorn, ĝardenisto, P.O.B.
2135, Tel-Aviv.

Ramat Hasharon. FD (Vegetarismo) : vakas.

Tel-Aviv. D : nova adreso : Jehuda Halevi-str. 109.

FD (Pacifismo) : Š. Zamir, mekanikisto, Ichak Elhanan-
str. 16.

JUGOSLAVUJO

Kočevje.

FD (Aŭtomobiloj) : B. Brezovšek, ŝoforo, ĉe GAP.

Ljubljana. FD (Aŭtomobiloj) : vakas.

Mitrovica (Srem). 16,000.

D : D. Orlović, tajloro, Sutjeská 9.

Varazdin.

FD (Teksindustrio) : M. Blass, oficisto, Mihanovićeve
ulica 10. Tel. : 460.

MUZIKA TERMINARO

M. C. BUTLER kaj F. MERRICK

Prezo afrankite:

10 pencoj aŭ 3 internaciaj respondkuponoj

Mendu ĉe U.E.A.

KANADO

Duncan (British Columbia). 3,000.

D : H. P. Devenish, bienisto, Duncan R.R.1. Tel. :
504.L.3.

Fort William (Ontario). 35,000.

D : C. C. Macdonald, advokato, Room 1, Royal Bank
Chambers. Tel. : 3-3471.

FD (Juro) : La D.

Victoria. D : nova adreso : Box 3276A, Latoria Road,
R.R.1.

KONGO BELGA

Elizabethstad. D : vakas.

Leopoldstad.

D : E. Symoens, instruisto, Prefect van het Koninklijk
Atheneum.

KOREO

Seoul. 1,500,000.

D : D. M. Seok, natursciencisto, Nacia Scienca Muzeo,
Nam San. Tel. : (5) 5550;1671.

MADEJRO

Funchal. FD (kristanismo) : nova adreso : Apartado 255.

MAROKO

Casablanca. FD (Sporto) : nova adreso : 23 Rue de
Dijon.

Meknés. FD (Instruado) : nova adreso : 23 Rue de
l'Oujda.

Oued-Zem : D. kaj FD : vakas.

NEDERLANDO

Amerongen (Utrecht). 3,500.

D : F-ino C. Zorgdrager, instruistino, Betonweg
C247.

Den Haag. FD (muziko) : vakas.

Deventer.

FD (Profesi-konsilado) : F-ino L. Adelaar, Brink-
greverweg 5. Tel. : 3198.

Eindhoven. D : nova adreso : Viottastraat 11.

Utrecht. FD (Hoteloj) : nova adreso : Stroomstraat 25.

NORVEGUJO

- Bergen.** VD : S-ino M. Wagle Jörgensen, piano-instruistino, Jomfrustien 7. Tel. : 99329.
Kristiansand S. (Vest-Agder). 1,500.
D : Ragnvald Horrisland, fervojisto, Mosby apud Kristiansand S. Tel. : 6541.
Oslo. D : Tel. : 38 03 16.

NOV-ZELANDO

- Auckland.** FD (Galvanizado) : vakas.
FD (Skoltismo) : vakas.
FD (Socialismo) : B. A. Ollerenshaw, studento, 12 Jellicoe Road, Murray's Bay.
Pinehaven.
FD (Vegetarismo) : S-ino F. MacGill, dommastrino, Wyndham Road.
Roxburgh. D : vakas.

POLLANDO

- Łódź.** FD (Tekniko) : nova adreso : Kilinskiego 172.
Przemysl (Rzeszów). 41,000.
D : W. Sochatynski, studento, ul. Jagiellonska 12.
Radom.
FD (Koopertivismo) : T. Rogalinski, oficisto, ul. Sienkiewicza 9 m. 18.
Warszawa. FD (Hebreaj aferoj) : nova adreso : Jagiellowska 27/23.
Wrocław.
VD : Tadeusz Jarzebowski, studento, skr. poczt., Wrocław 12.
Zgierz a. Łódź. D : vakas.

PORTUGALUJO

- Barreiro.** FD (Studentaj aferoj) : vakas.
Beja. D : nova adreso : Bairro Dr. Oliveira Salazar 8 - D
Leiria. D : vakas.
Lisboa. FD (Turismo) : vakas.

RUMANUJO

- Bucuresti** (Muntenia). 1,150,000.
FD (Patentoj) : I. Giuglea, patent-agento, Str. Páicii 4, Dámároaia.
Cluj. (Transilvania). 140,000.
D : E. Schlesinger, librotenisto, str. Molotov 22.
VD kaj FD (Komerco) : vakas.
FD (Filatelo) : La D.

SVEDUJO

- Gävle.** FD (Instruado) : A. Lenner, instruisto, Bygmästargatan 15. Tel. : 6807.
Göteborg. FD (Komerco) : nova adreso : Konstapelsgatan 4 A. Tel. : 15.75.14.
Hälsingborg. FD (Trafiko) : A. Lundgren, tramisto, Mell Stenbocksgatan 9. Tel. : 15767.
Hjälteby. FD (Abelkulturo) : Gunnar Åsemyr, instruisto.
Höviksnäs. FD (Abelkulturo) : vakas.
Hudiksvall. D : vakas.
Kristinehamn (Värmland). 15,700.
D : K. V. Johansson, subgisestro, Vahlundsvägen 13 D.
Lund. FD (Instruado) : O. Olsson, instruisto, Bantorget 3.
Motala. VD : S. Ohrner, Instruisto, Terassgat. 8. Tel. : 3021.
Sandared. D : vakas.
Skellefteå (Västerbotten). 13,000.
D : A. Bränström, oficisto, Box 69. Tel. 10466.
Sparsör (Västergötland). 1,500.
D : Bengt Markling, komercisto, Villa Solhamra. Tel. : Borås 60470.
Stockholm. FD (Reklamado) : adreso : Sareksv. 5, Bromma.
Strömsnäsbruk. FD (Dentistaj aferoj) : vakas.

SVEDUJO

Tranås (Småland). 10,000.

D: Y. Svansson, vojaĝoficestro, Reso Resebyrå,
Storgatan 11. Tel.: 4660.

Trollhättan (Västergötland). 22,000.

D: E. Lind, inĝeniero, Dicksonsgat. 6 A. Tel.:
13224.

Västerås. FD (Vegetarismo): vakas.

SVISLANDO

Arbon (Thurgau). 10,000.

FD (Tekstaj-maŝinoj): W. Kobelt, maŝin-seruristo,
Landquartstr. 81 b.

Bern. FD (Skoltismo): vakas.

Genève. D kaj FD (Bahaismo): vakas.

Lausanne. FD (Librobindado; Gimnastiko): vakas.

Marbach. D kaj FD: vakas.

Zug. FD (Librobindado): H. Herrmann, libro-
bindisto, Vorstadt 24.

TURKUJO

Malatya. 41,000.

D: Ferruh Canatay, Kiĝili ap. kat 1. Tel.: 70.

USONO

Bloomington (Indiana). D kaj FD: vakas.

Chicago (Illinois). D kaj FD (Juro): nova adreso:
127 N. Dearborn St.

Cranford (New Jersey). D: vakas.

Fallbrook (California). D: nova adreso: Box 158.
Tel.: FB7007.

Flint (Michigan). D: vakas.

New Auburn (Wisconsin). D: vakas.

New York (N.Y.). FD (Desegnado): nova adreso:
599 West End Ave., New York 24.

Phoenix (Arizona). D: nova adreso: Route 2, Box
1437.

San Francisco (California). VD: vakas

Seattle (Washington). FD (Literaturo): vakas.

RAPORTO de la ESTRARO de U.E.A.

1 JULION 1949

1. **Enkonduko.** Dum la jaro 1948 U.E.A. kreskis per proksimume 1000 membroj. Tiu kresko tamen tute dependis de la pligrandigo de Asociaj Membroj. La nombro de aktivaj membroj, kiuj donas la plej grandan monkontribuon al nia asocio, malkreskis pro la malfacilaĵoj sendi kotizojn trans la landlimojn. Ĝenerale la movado en la mondo plifortigis. En ĉiuj kontinentoj ni havas fortajn bazojn por la estonta agado.

2. **Landaj Asocioj.** U.E.A. konsistas nun el 21 Landaj Asocioj. Novaliĝintaj asocioj estas:—
Asocio de Esperantistoj en Pollando;
Kroatia Esperanto-Ligo;
Slovenia Esperanto-Ligo.

3. **Fakaj Asocioj.** Sep Fakasocioj nun havas kontrakt-ojn pri kunlaboro.

4. **Nombro de membroj.** La nombro de la membroj je la fino de 1948 estis: AM 11587; MJ 985; MA 4541; MS 345; Pat. 21; DM 172; HM 56. Sume 17,707.

5. **Honora Membro.** Dum la kunsido en Malmö la Komitato elektis kiel novan Honoran Membron S-ron R. Rian, Norvegujo.

6. **Delegitoj.** En la ĉi-jara printempo ni havis 1108 delegitojn, 184 vicdelegitojn kaj 932 fakdelegitojn, entute 2224 en 58 landoj.

7. **Financoj.** En la Jarlibro aperis detalaj ciferoj. La malgajno £190 dependas de cirkonstancoj (vidu sub *Enkonduko*) pri kiuj ni ne havis klaran bildon en la komenco de la jaro. Por la nuna jaro ni havas esperon pri ekvilibro de la spezoj.

8. **Oficejoj.** En Rickmansworth la oficistaro konsistas el la samaj personoj kiel lastjare: S-ro Sekretario C. C. Goldsmith, S-ro Mason Stuttard kaj F-ino K. E. Tofield. (Ŝi tamen ĵus formigris al Nov-Zelando).

En Genevo S-ro Hans Jakob deĵoris sensalajre. Bedaŭrinde la ĉambrojn, kiujn okupis U.E.A. en Palais Wilson, oni devis cedi al la Internacia Rifuĝinta Organizaĵo, kiu tamen supozeble ĉesigos sian agadon en 1950. Intertempe la biblioteko kaj la materialo de U.E.A. estas metita en la Arkivejon teretaĝan.

9. **Gazeto.** Redaktoro estis S-ro Hans Jakob kaj helpredaktoro S-ro Mason Stuttard. Laŭ la teknikaj kaj ekonomiaj ebloj la redakcio provis kontentigi la dezirojn de la Komitato, kiu dum la kongreso en Malmö faris diversajn sugestojn pri la enhavo.

10. **Jarlibro.** La Jarlibro 1948 aperis kiel kutime en 2 volumoj, el kiuj la dua enhavis ankaŭ la statutojn de U.E.A. kaj de la Akademio de Esperanto.

La unua parto de la jarlibro 1949 aperis en aprilo kun enhavo simila al antaŭaj eldonoj.

11. **Universala Kongreso 1948.** Al la kongreso en Malmö aliĝis 1761 personoj, el kiuj 1501 ĉeestis. La kongreso bone sukcesis, ankaŭ finance (vidu la jarlibron).

12. **Komitato.** La Komitato de U.E.A. nun havas 38 membrojn, el kiuj 28 estas elektitaj de la Landaj Asocioj, 5 de la Deleĝitoj de U.E.A. kaj 5 alelektitaj membroj.

Dum la kongreso en Malmö la Komitato havis 5 kunsidojn. Apartan protokolon pri tiuj la komitatanoj jam ricevis.

13. **Oficialigo de Esperanto.** Laŭ la decido de la Komitato la Estraro direktis admonon—pere de la jarlibro, per la gazeto kaj per cirkuleroj—al la Landaj Asocioj instigi la koncernajn registarojn, parlamentojn kaj aliajn instancojn oficiale rekoni Esperanton, speciale per aranĝo de kursoj por la instruistaro kun ŝtata monsubvencio.

Jen resumo pri atingitaj rezultoj en tiuj landoj, de kiuj ni ricevis informojn. Oni bonvolu noti, ke en pluraj lokoj kaj landoj oni ekagis tute sendepende de nia admono.

Aŭstralio : Infankorespondado sub aŭspicioj de la klubo de Internacia Korespondamikeco de la Instruista Federacio.

Aŭstrujo : Aŭstra ĝenerala direktoro de poŝto kaj telegrafo admonis per skribaĵo la kolegojn en ĉiuj landoj apogi Esperanton. Poŝtmarko kun Esperanta teksto aperis somere 1949.

Inŝtruministro Felix Hurdes funkciigis du ŝtatajn ekzamen-komisionojn por la temo Esperanto ĉe mezgradaj lernejoj.

Brazilo : Konsilantaro de la komunumo Porto Alegre asignis (20.XII.1948) al la Esperantista Societo 2433 kruzejrojn; la registaro de Rio Grande do Sul asignis (18.XII.1948) al la Esperantista biblioteko 3000 kr., kaj la parlamento de la sama ŝtato (20.XII.1948) 20,000kr. por kultura aktiveco en la Esperantistaj societoj. La Sekretario pri Edukado "rekomendas (3.III.1949) al ĉiuj instruistoj de la ŝtato Rio Grande do Sul doni specialan intereson al Esperanto, petante, ke vi apogu kaj helpu ĝian disvastigon per ĉiuj rimedoj je via dispono." Okazis oficiala kurso por oficistoj de la Statistika departemento en la ŝtato Santa Catarina.

En la ŝtatoj Rio de Janeiro, Serjipe kaj Federacia Distrikto Esperanto-instruado estas laŭleĝe permesata en unuagradaj kaj normalaj lernejoj.

Oficialaj kursoj okazis dum pluraj jaroj en Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko en Rio de Janeiro kaj Florianópolis.

Brazila Ligo Esperantista dum pli ol 25 sinsekvaj jaroj ricevis ŝtatan subvencion por sia agado.

La politika partio "Partido Republicano" en rezolucio favoris Esperanton.

Britujo : Ministro de Edukado oficiale deklaris, ke li ne malrekomendas Esperanto-instruadon en la lernejoj. Jam de multaj jaroj kursoj okazas en diversaj urboj laŭ decido de la lernejaraj aŭtoritatoj. Ankaŭ okazas laŭ loka postulo vesperkursoj por plenaĝuloj kaj la instruistoj de tiaj kursoj ricevas pagon de la oficialaj instancoj same kiel por aliaj lernejaraj temoj.

Ĉeĥoslovakujo : Ministerio por Informoj kaj Klerigado rekomendis (11.1.1949) al distriktaj klerigaj konsilantaroj aranĝi kursojn de Esperanto.

Esperanto estas instruata en 13 duagradaj kaj 14 triagradaj lernejoj kun entute 865 gelernantoj.

Ĉilio : En Santiago ĉe la Universitato okazis kurso.

Danujo : Dana Ministerio de Eksteraj Aferoj eldonis filmon kun Esperanto-tekstoj pri la historio, kulturo kaj ekonomio de la lando.

Egiptujo : Kursoj okazis en Komerca Instituto, Y.M.C.A., kaj en Amerika Universitato.

Germanujo : En 112 altlernejoj oni instruis Esperanton dum 1948. En Berlin la magistrato favore respondis la proponon de la Germana Esperanto-Asocio pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kaj komence de 1949 oni instalas oficialan Esperanto-informejon por geinstruistoj kaj gelernantoj. Fondiĝis 8.I.1948 Esperanto-Instituto en München, kiu en interligo kun la universitato tie okazigos diplomajn ekzamenojn. Bavara Instruista Asocio akceptis (7.XI.1948) rezolucion favore al enkonduko de Esperanto en la popollernejojn. Oficiala kurso por instruistaj aspirantoj okazis en Köth-Friedberg. Kvar kursoj okazis en la instruista akademio en Bamberg laŭ instigo de la bavara instrumministro D-ro Hundhammer.

Esperanto estas instruata en la universitatoj de München kaj Mainz kaj en la Teknika Alternejo en München.

La Instrumministro en Württemberg monsubvenciis la Esperanto-grupon en Stuttgart per 500 gm. por akceli ĝian liberan popoledukadon.

Grekujo : Kursoj okazis kiel dum multaj antaŭaj jaroj, en kelkaj ŝtataj altlernejoj kaj gimnazioj.

Hungarujo : Laŭ permeso de la hungara instrumministro, Esperanto povas esti instruata en la lernejoj kiel libervola temo, same kiel la latina lingvo, muziko, k.t.p.

De la jaro 1947 la urbestro de Budapest sinsekve aranĝas kursojn por pedagogoj.

Italujo : Itala kongreso de Federalisma Eŭropa Movado (23/25.IV.1949) aprobis rezolucion pri uzado de Esperanto por tiu movado.

La Federacio Esperantista en 1948 prezentis al la Ministerio de Edukado detale ellaboritan proponon pri Esperanto-instruado en la lernejoj. Komisiono por "lernejreformo" nun pritraktas la proponon.

De 1946 okazas en Milano en mezlernejoj kursoj subvenciitaj de la urbo.

Japanujo : Diversaj kursoj en universitatoj kaj gimnazioj.

Kongo Belga : Kurso okazas en la lernejo de Elizabethstad.

Koreo : Korea Esperanto-Instituto direktis proponon al la registaro kaj al la parlamento pri enkonduko de Esperanto

en la lernejojn. En Seulo oni instruis Esperanton en la Universitato kaj en kelkaj gimnazioj.

Nederlando : La Esperantistoj vizitis la Instruminstron pro akceptota nova instruleĝo. Dum la instruaro 1948-1949 oni instruis Esperanton en 27 diversaj lernejoj kiel nedevigan temon post la ordinaraĵ lerneĵhoroj. Kurso okazis en la seminario Haarlem. Oficiala kurso estis aranĝata por la policistoj en Den Haag.

Norvegujo : Kune kun la Asocio de Norvegaj Popol-lernejaj Instruistoj estas eldonita koresponda kurso en Esperanto.

Novzelandoj : Registara perkoresponda lernejo dissendis per radio Esperanto-lecionojn en la aŭtuno 1948.

Pollando : Ministerio de Poŝto decidis (4.XI.1948) instigi lernantojn de profesiaj kursoj, aranĝataj por poŝtistoj, al nedeviga lernado de Esperanto. Ankaŭ Instruadoficejo de Ministerio de Fervojoj rekomendis lernadon de Esperanto. Ĉefa estraro de Profesia Unuiĝo de Konsumlaboristoj per cirkulero al la filioj rekomendis Esperanton.

Svedujo : La parlamento asignis kiel antaŭe 5000 kr. (=£340) al oficialaj Esperanto-kursoj por geinstruistoj. Kune kun tutlanda Laborista Kleriga Asocio la Sveda Esperanto-Instituto aranĝis 26 junion—1 julion, 1949 internacian kurson pri "Sveda Socia Strukturo kaj Sveda Socia Politiko." Proks. 50 svedaj oficistaj kaj laboristaj fakorganizaĵoj donacis monon al stipendioj por ebliĝi eksterlandanojn partopreni.

Svislando : Svisa Esperanto-Societo proponis al Kantono Zürich aranĝi kurson por la instruistaro kaj permesi Esperanto-instruadon en la lernejoj. En du komunumoj oni permesis Esperanto-instruadon en la lernejoj, sed mankis instruistoj. Svisa Esperanto-Societo aranĝis en aprilo 1949 kurson por geinstruistoj.

Urugvajo : Antaŭpreparoj estas faritaj por akiri certajn favorojn de la ŝtato al la Esperanto-movado.

14. **Malpermeso de Esperanto-instruado.** *Kanariaj Insuloj.* En La Laguna la rektoro de la universitato malpermesis Esperanto-kurson.

Portugalujo: La Esperantistoj en diversaj urboj suferis pro la persekuta vizito de policistoj, kiuj eĉ forrabis Esperantajn leterojn, dokumentojn, emblemojn k.s.

15. **Radio** : Esperanto ricevis oficialan rekonon en multaj ŝtatoj tiel, ke la Esperantistoj ricevis la rajton dissendi per la radio Esperanto-programojn. Radiaj dissendoj okazis en Aŭstralio, Aŭstrujo, Brazilo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Nederlando, Pollando, Svedlando, kaj Svislando.

16. **Propagando**. Dum la U.K. en Malmö la Komitato decidis starigi propagandan centron, kiu prenu sur sin la taskon kolekti kaj distribui proponojn pri propagando diversspeca. Kiel estro de tiu centro estis elektita S-ro Jan Strönne, Malmö, kiu tamen hezitis akcepti la postenon. Dum la pasintaj monatoj li ne povis plenumi la proponitan taskon pro aliaj laboroj i.a. multaj detaloj post la 33-a U.K. kaj nova prezidanteco de la sveda asocio. Ankoraŭ ne plene akceptinte la postenon li nun proponas :

a ke ĉiuj landaj organizaĵoj aranĝu t.n. " Esperanto-semajnon " en la aŭtuno;

b ke la koncernaj organizaĵoj faru sian plejblon por aranĝi ekspoziciojn, prelegojn, k.t.p. dum la proponita semajno.

c ke U.E.A. al la Landaj Asocioj distribuu listojn por proponoj koncerne propagandajn detalojn k.t.p.

17. **UNESCO-aferoj**. La Komitato elektis S-ron E. D. Durrant komisiito por UNESCO-aferoj. Li energie laboris en tiu kampo, faris vizitojn ĉe koncernaj aŭtoritatoj, prezentis proponojn kaj gardis niajn interesojn. Dum la kongreso en Bournemouth li faros detalan raporton pri sia agado.

18. **Petskribo**. La ĝisnuna cifero estas proksimume 16,348,400.

19. **Raporto de Rousseau-Instituto**. La Komitato petis L.K.K. en Malmö multobligi tiun raporton. Sveda Esperanto-Federacio presigis ĝin kaj disponigis al ĉiuj komitatanoj kaj landaj asocioj.

20. **Somera Universitato, Malmö**. Laŭ komisiono de la Estraro la libro enhavanta la prelegojn estas eldonita de The Esperanto Publishing Company Ltd.

21. **Raporto de Svisaj Instruistoj**. Centra Oficejo de U.E.A. multobligis kaj dissendis tiun raporton.

22. **Oratora konkurso**. La Estraro decidis okazigi oratoran konkurson por junuloj en la kongreso en Bournemouth.

23. **Kontakto kun S.A.T.** Interkonsento ankoraŭ ne estas atingita pri la maniero de la kunlaboro. La prezidanto detale raportos dum la kongreso en Bournemouth.

24. **Someraj kursoj kaj restadejoj**. Kun ĝojo ni konstatas, ke en pluraj landoj oni por la somero 1949 planas somerkursojn kaj restadejojn por la Esperantistoj. Laŭ ricevitaĵaj informoj granda nombro aliĝis kaj jam garantiis sukceson en ĉiu loko, do : en Danujo sub aŭspicioj de U.E.A., Ĉeĥoslovakujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Nederlando, Norvegujo kaj Svedujo.

25. **Estraraj kunsidoj**. La Estraro kunsidis dum la Kongreso en Malmö. La kunsidojn, kiuj kutime okazas dum pasko, ni prokrastis, unue ĉar ne troviĝis multaj gravaj pritraktaĵoj kaj due ĉar ni volis ŝpari monon al la asocio per tio, ke ni utiligu la kongreson en Bournemouth, kiu situas en la sama lando kiel la Centra Oficejo, por kunvoki la Estraron je tiu tempo.

Post skriba traktado la Estraro faris decidon pri la loko de la Universala Kongreso en 1950 (Parizo) kaj pri la budĝeto por 1949.

26. **Kontakto kun la membroj**. Tio ĝenerale estas bona, kiel oni vidas laŭ la jenaj ciferoj pri korespondaĵoj en 1948 :

Ricevitaj	9520
Senditaj	24025
	<hr/>
	33545

Por la Estraro :
(Subskribis) E. MALMGREN,
Prezidanto.

MARISTA TERMINARO

(PARTO I)

de

Komandanto Peter Clissold, D.B.E.A.

ENHAVO

	paĝo
Antaŭparolo	28
1. Navigacio	30
2. Astroj uzataj de la navigisto	35
3. Terminoj uzataj dum veturado	36
4. Administrado kaj organizo de ŝipoj	36
5. Specoj de ŝipoj, barkoj, boatoj, k.s.	37
6. Ŝipkonstruo kaj boatkonstruo	48
7. Maŝinaro	50
8. Partoj, ekipaĵoj kaj ilaroj de ŝipo	50
9. Veloj kaj rigilaro	55

ANTAŬPAROLO

La tradukanto en la internacian lingvon povas havi unu el du celoj. Unue, la celo estas precizeco kaj klareco, ekzemple en instruo aŭ priskribo. Due, la celo estas konservi la nacian aŭ tempan guston, ekzemple en romano aŭ historio. Ekzemplo de la dua el imaga Angla rakonto: "La boatestro fajfis, kaj la Komodoro saltis en sian apudan bargon kaj estis forremata." Tradukante ĝin laŭ la unua

celo: "La ekipestro fajfis kaj la Subadmiralo saltis en sian apudan pinason kaj estis forremata." Ĉar la boatestro (Angle *boatswain*, France *maitre d'equipage*, Germane *Bootsmann*, Hispane *contra-maestre*, Itale *nostramo*) fajfadis, sed li delonge ne deĵoras kiel boatestro (en Anglaj ŝipoj); *bargó* (Angle *barge*) estas nomo uzata por admirala boato (inter aliaj tre malsimilaj).

Mia devo estis pli difini ol elpensi novajn vortojn. Estas pli bone ke vorto havu nur unu signifon. En la Angla lingvo kaj, sendube, en aliaj, nomoj de klasoj de ŝipoj ofte enhavas kelkajn tre diversajn specojn. Ekzemple kutro (Angle *cutter*) nuntempe signifas (1) larĝa boato de ŝipo; (2) unumasta velŝipo; (2) malgranda Usona militŝipo por eskorta aŭ patrola deĵoro. Mi enlistigis nur la duan priskribon. La unua speco iĝas *pinaso* (dekmetra), la tria *korveto*. Kompreneble la tradukanto povas uzi la nacian vorton, preferinde kun mallonga priskribo.

Neologismoj proponataj havas apudan*. Terminojn ankoraŭ oficiale permesatajn sed, laŭ mia opinio, malpli dezirindajn ol aliaj, pro troeco aŭ pro tio, ke ekzistas pli Esperanta sinonimo, mi enmetis en krampojn: ().

Se sinonimoj ekzistas mi disigas ilin per / kiel ĉe *ŝipsubestro/maato*. Se parton de kunmetita vorto oni povas ellasi mi enmetas ĝin en krampojn: (*ŝip*)subestro.

La *Provo de Marista Terminaro* eldonita de Hachette, Parizo dum 1908 estis mia ĉefa konsultlibro Esperanta, kaj ankaŭ *From Keel to Truck* (De Kilo al Masta Butono) de Kapitano H. Paasch, verkita en la lingvoj Angla, Franca, Germana, Hispana kaj Itala. Ambaŭ libroj estas ne plu aĉeteblaj. Mi petas pardonon de Germanoj, Hispanoj kaj Italaj se eraroj estas troveblaj en Parto 16. Mi ne scias aliajn lingvojn. Tamen mi esperas, ke ili povos eltrovi pli ĝustan tradukon por la Esperanta difino.

Al miaj konsultantoj kaj kunlaborantoj: Kapitano Colin Nicholson R.N.R., S-ro M. C. Butler, M.R.S.T., S-ro E. D. Durrant, D.B.E.A., Prof. W. E. Collinson, M.A., Ph.D., kaj S-ro E. Chicot en Francujo, mi esprimas plej koran dankon pro iliaj zorgaj tralegoj kaj helpaj proponoj.

P. CLISSOLD.

1. NAVIGACIO, NAVIGARTO

Alto : la angulo interastro, observanto kaj horizonto.

Vera Alto : la angulo inter la centro de astro, observanto kaj la ĉiela horizonto, mezurata laŭ vertikala cirklo tra la astro kaj la zenito de la observanto. **Vera Alto de la Poluso** : egalas la latitudon de la observanto.

Amplitudo : la distanco for de la *orienta punkto* kie astro leviga, aŭ la distanco for de la *okcidenta punkto* kie ĝi malleviga. La distancoj estas arkoj de la horizonto mezurataj norden aŭ suden.

Aries, Unua Punkto de : la punkto apud la zodiaka signo Aries kie la ekliptiko renkontas la ĉielekvatoron je la printempa ekvinoksa punkto.

Ascencio, Rekta (R.A.) : la angula distanco mezurata orienten laŭ la ĉielekvatoro inter la Unua Punkto de Aries kaj la meridiano de la astro. ***Astra Longitudo**.

Astro : ĉiela lumiganto t.e. la suno, la luno, planedoj, kaj la steloj. **Astra Longitudo** kaj **Astra Latitudo** (Deklinacio) estas proponataj. Ili malsimilas al Ĉiela Latitudo (kiujn oni tute ne uzas en navigarto), kiuj estas mezurataj laŭ, la ekliptiko/sunvojo.

Astrolabo : mezepoka sekstanto.

Azimuto : la angulo-astro; zenito, poluso.

(Biro) : direkto aŭ linio de direkto. **Krucaj Biroj**.

Ĉefa Cirklo : cirklo de la sfero, kies ebena trairas la centron de la sfero. Arko de ĉefa cirklo estas la plej mallonga distanco inter du punktoj. **Vertico** de ĉefa cirklo estas la punkto kie ĝi plej proksimiĝas al la poluso. **Kunmetita Vojo** : vojo de du arkoj de ĉefaj cirkloj kun, inter ili, arko de paralelo de latitudo uzata ekzemple kiam sola ĉefa cirklo inter du lokoj trairas tro altajn latitudojn. **Malĉefa Cirklo** : sfera cirklo, kies centro ne estas la centro de la sfero.

Ĉiela Ekvatoro : ĉefa cirklo kie la ebena de la tera ekvatoro tuŝas la ĉielan sferon.

Ĉielaj Polusoj : la du punktoj en la ĉiela sfero montrataj per la plilongigata akso de la tero.

Ĉiela Sfero : la grandega sfero, kun la tero ĉe la centro, sur kiu la astroj ŝajne troviĝas.

Deklinacio : la angula distanco de astro norden aŭ suden de la ĉiela ekvatoro (***Astra Latitudo**).

Direkto. Vera Direktio : la direkto mezurata for de la meridiano. **Magneta Direktio** : mezurata for de la magneta meridiano. **Kompasa Direktio** : mezurata for de la kompasa nord- aŭ sud-punkto.

Direkto-Distanco (D.D.) : vera direkto kaj distanco irita aŭ irota inter du lokoj.

E=12 horojn—tempa ekvacio.

Efemeridoj : listaro de lokoj de astroj.

Ekliptiko/Sunvojo : la ŝajna vojo de la suno sur la ĉiela sfero.

Ekvatoro : ĉefa cirklo de la tero egaldistanca de la polusoj.

Flankira Angulo/Drivangulo : la angulo inter la laŭlonga akso de la ŝipo kaj ĝia direkto tra la akvo.

Fluo : movado aŭ *rivero* pli aŭ malpli konstanta, fluanta tra la maro.

(Globuso) : terglobo.

Greniĉa Meridiano : la meridiano kiu trapasas la Greniĉan observejon ĉe Greenwich apud Londono, de kie longitudo estas mezurata. La Unua Meridiano.

Hora Angulo (H.A.) : angulo inter astro, poluso kaj zenito mezurita ĉiam okcidenten.

Horaj Zonoj : zonoj sur la tero en kiuj horlaĝa horo oportune estas nomata same. Ĉiu zono estas 15°, aŭ 1 horon larĝa. Zono 0 komenciĝas ĉe Greniĉo, etendiĝante 7½° okc. kaj 7½° or. Zono +1 etendiĝas de 7½° ĝis 22½° okc. Zono -1 de 7½° ĝis 22½° or.

Horizonto. Videbla Horizonto : la malĉefa cirklo ĉirkaŭ la observanto, kie ĉielo kaj maro ŝajne renkontiĝas.

Ĉiela Horizonto : ĉefa cirklo de la ĉiela sfero trapasanta la tercentron kaj paralela kun la ebena de horizonta cirklo tra la okulo de la observanto. **Artefarita Horizonto** : anstataŭaĵo por la horizonto.

Horizonta Subiĝo : la angulo inter la horizonta ebena tra la okulo de la observanto kaj la videbla horizonto.

Kompaso : nordon- kaj sudon-montranta ilo per kiu oni vidas la kompasan direkton. **Giroskopa Kompaso** : montras nordon per rapide ĉirkaŭiranta giroskopa rado. **Magneta Kompaso** montras magnetan nordon per

magnetaj montriloj, kiuj estas ligitaj al *kompaskarto* en vazo. La vazo troviĝas en kompasujo kiu havas forpreneblan kovrilon. Prismo sidas sur la vazo por faciligi la observadon de direktoj. Sur la interna flanko de la vazo estas desegnita, laŭ la akso de la ŝipo, **prulinio/kaplinio**.

Klafto = 6 Anglaj futoj = 1.829 metroj. 2 metroj = 6.56 futoj.

Kompasa Devio (Deviacio): pro ŝipa fero la magnetna kompasno ne ĉiam montras la magnetan poluson. Ĉi tiu diferenco estas nomata devio aŭ deviacio.

Kompasa Ekarto: la diferenco inter la kompasna nordpunkto kaj la meridiano. $K.E. = \text{Magnetna Vario} \pm \text{Devio}$.

Krepusko: mara krepusko komenciĝas aŭ finiĝas kiam la suno estas 12° sub la horizonto, kaj astronomia krepusko je 18° .

Kronometro: tre preciza horloĝo speciale konstruita kontraŭ ŝanĝoj de temperaturo.

Latitudo: la angula distanco, norden aŭ suden, inter loko kaj la ekvatoro. **Altaj Latitudoj** estas latitudoj pli proksimaj de la polusoj.

Linio de Distanco, Distanca Linio: linio etendiĝanta de la kalkulita loko, ĉu al ĉu for de la astro, tiel longa kiel la diferenco inter la kalkulita kaj vera zenitaj distancoj.

Linio de Loko: linio sur mapo, sur kiu la observanto staras.

Linio Egalalta: arko de ĉefa cirklo, kies centro estas observita astro sur kiu, iapunkte, la observanto sidas. La radio egalas la veran zenitan distancon.

Logo: ilo por mezuri la distancon iritan de ŝipo tra la maro.

Loko de la ŝipo. Observita loko/Punkto: estas eltrovata per viditaj astroj aŭ landaj signaĵoj. **Taksita Punkto**: estas eltrovata per kalkulo de direkto kaj distanco plus korektoj pro tajdo aŭ fluo. Ĝi egalas la supozitan lokon. **Kalkulita Punkto**: estas kalkulata laŭ direkto kaj distanco iritaj kiel estas montrate de kompasna kaj logo.

Loksodromio/Loksodromia Linio: linio sur sfero, kiu trapasas egalangule ĉiujn meridianojn. Linio laŭ kiu ŝipo iras se ĝi iras sen ŝanĝo de direkto.

Longitudo: la angula distanco laŭ la ekvatoro inter la meridiano de loko kaj la Greniĉa meridiano.

Magnetna Vario (Magnetna Deklino): la diferenco en direkto de la meridianoj kaj la magnetaj meridianoj, kaŭzata de la magnetaj polusoj kiuj ne koincidas kun la veraj polusoj.

Marmapo: desegnaĵo de marbordo kaj/aŭ maro. **Merkatona marmapo**: desegnita laŭ la projekcio de Merkatona. **Gnomona Marmapo**: desegnita laŭ la gnomona projekcio en kiu la ĉefcirkloj aspektas nekurbaj.

Marmejlo: Distanco farata de angulo de $1'$ ĉe la tercentro laŭ meridiano en latitudo 48° . 1 marmejlo = 1852 metroj. 1 km. = .539 MM.

Meridianoj: ĉefaj cirkloj kunigantaj la polusojn. **Magnetaj Meridianoj**: trapasas la magnetajn polusojn.

Meridiana Distanco: la nombro de arkaj minutoj inter iu latitudo kaj la ekvatoro laŭ merkatora mapo.

Mezlatitudo: la aritmetika mezo de du latitudoj. **Vera Mezlatitudo**: kiam la diferenco de latitudo estas granda, aŭ la latitudoj estas *altaj*, la aritmetika mezo ne estas la vera mezo: ĝi bezonas malgrandan aldonan ĝustigon.

Nodo: rapideco de unu marmejlo ĉiuhore. Tiel nomata pro nodo en logŝnuro, per kiu oni mezuris la rapidecon.

Paralakso: la angulo inter observanto, astro kaj tercentro.

Paraleloj de Latitudo: malĉefaj cirkloj, kies ebenaĵoj estas paralelaj kun la ekvatoro.

***Paralela Distanco**: la distanco (orienten aŭ okcidenten) trapasata de ŝipo vojaĝanta de unu loko al alia.

Polusoj: la veraj aŭ teraj polusoj estas la norda kaj suda punktoj ĉe la fino de la tera akso. **Magnetaj Polusoj**: estas la lokoj al kiuj la montriloj de magnetaj kompasoj montras.

Polusa Distanco: la distanco de astro for de la poluso.

Prua Angulo/Ŝipdirekto (ŝip)kapa angulo/(Kapusa angulo), **Vera Prua Angulo**, **Vera Kapo**: la angulo kiun la ŝipa kapo aŭ pruo faras kun la meridiano. **Kompasna Prua Angulo**: la angulo, kiun la pruo faras kun la kompasna nordo aŭ suda punkto.

Punkto: vidu **Loko de Ŝipo**.

R : la rekta ascencio de la Meza Suno $+12$ horoj.

***Radaro** (Angle : *radar*) : radia aparato kiu montras la direkton kaj distancon de ŝipoj kaj marbordo.

Refrakto : la kurbigo de radio de lumo kiam ĝi pasas el unu aera tavolo en alian de malsama denso.

Rekta Ascencio : vidu **Ascencio**, **Rekta**.

Sekstanto : mezurilo por anguloj, speciale la angula alto de astroj super la horizonto. Sekstanto havas spegulojn kun kolorigitaj vitroj, alidadon kun verniero, arkon kun gradajoj, kaj lornojn.

Sidera Horo : la angulo : observanto, poluso, meridiano de la Unua Punkto de Aries, ĉiam mezurata okcidenten.

Sondi : (1) mezuri la profundon de la maro. Sondilo konsistas simple el plumbo kaj plumboŝnuro, aŭ vinĉo kun ŝtalfadeno kaj plumbo kun vitra tubo en latuna tubingo. **Eĥa Sondilo** : aparato kiu registras la profundon per eĥo. (2) mezuri akvon en la profundo de ŝipo per sondŝnuro en sondtubo.

Suno : **La Meza Suno** estas fiktiva suno, kiu ĉirkaŭiras egalrapide la ĉielan ekvatoron dum la sama tempo kiel la Videbla aŭ Vera Suno ĉirkaŭiras la tutan ekliptikon.

Tabelaro, Navigista : libro kiu enhavas tabelojn por helpi navigistojn; ekzemple, ***Traversa Tabelo**, logaritmoj, sinusoj, tangentoj, sekantoj, duonversinoj, k.c. Traversa Tabelo enhavas ĉiujn partojn de orta triangulo : direkton, distancon, paraleldistancon, diferencon de latitudo.

Taglibro : libro en kiu estas skribata ĉio pri la navigado kaj konduko de la ŝipo.

Tajdo : la ĉiutaga movado de la maro. ***Grandtajdo** : leviĝas kaj malleviĝas pli ol mezaj tajdoj. ***Malgrandtajdo** : leviĝas kaj malleviĝas malpli ol mezaj tajdoj. Pri la tajda fluo : la flua tajdo estas tajdo leviĝanta ĝis alta tajdo, kaj reflua tajdo malaltiĝas ĝis malalta tajdo. La horo de la alta tajdo post la kulmino de la plena luno estas la **Stablimento de la Haveno**.

Tempo : **Meza Tempo** estas tempo mezurata laŭ la meza suno kaj sekve per horloĝoj. **Greniĉa Meza Tempo** (G.M.T.) : meza tempo de la meridiano de Greniĉ. **Greniĉa Meza Horo**.

Tempa Ekvacio : la diferenco de meza tempo kaj vera tempo (tempo mezurata laŭ videbla suno) t.e. H.A.M.S. minus H.A.V.S. 12 hr.—Tempa Ekvacio=E.

Tera Loko/Subastra Loko : la tera loko de astro estas la punkto sur la tero ĝuste sub la astro.

***Trikorna Ĉapelo** : la spaco inter tri transiraj linioj.

(Vent) **drivo** : la distanco irata rekte for de la vento.

Vertikalaj Cirkloj : ĉefcirkloj trapasantaj la zeniton.

Zenito : punkto sur la ĉielo ĝuste super la observanto.

Zenita Distanco : la angula distanco inter astro kaj zenito. Z.D.=90—Alto.

Zodiako : la zono de la ĉielo tra kiu la suno ŝajne iradas.

2. ASTROJ UZATAJ DE LA NAVIGISTO

La astroj, suno, luno, planedoj, steloj, leviĝas, trairas meridianon kie ili kulminas kaj poste subiras.

La planedoj : Jupitero, Venuso, Marso, Saturno.

Steloj : oni povus nomi ĉiujn per la latina nomo, ekzemple *a Ursae Majoris*, sed iuj havas apartajn nomojn. Jen la plej bone konataj :

Akernaro (a Eridano)	Fomalhaŭto (a Piscis Australia)
Aldebarano (a Tauri)	Hamalo (a Arietis)
Alfako (a Coronae Borealis)	Kapelo (a Auriqae)
Alfardo (a Hydrae)	Markabo (a Pegasi)
Alfaraco (a Andromedae)	La Polusa Stelo aŭ La Norda Stelo (a Ursae Minoris)
Altairo (a Aquilae)	Polukso (a Gemini)
Antareso (a Scorpii)	Prociono (a Canis Minoris)
Arkturo (a Bootis)	Reguluso (a Leonis)
Belatrikso (j Orionis)	Rigelo (B Orionis)
Benetnaso (Ursae Majoris)	Siriuso (a Canis Majoris)
Betelguso (a Orionis)	Spiko (a Virginis)
Denebo (a Cygnis)	Vego (a Lyrae)
Denebolo (B Leonis)	
Dubheo (a Ursae Majoris)	

3. TERMINOJ UZATAJ DUM VETURADO

Antaŭ **veturo/vojaĝo** ŝipo devas esti martaŭga t.e. ne traflueta, sen kliniĝo, ĝuste ekvilibrita, kun sufiĉo da brulaĵo kaj provizaĵoj, kun la holdaj kovriloj kaj gudrotukoj fiksitaj. La (pas)ponteto estas mallevigita ĝis la kajo kaj la ŝnuregoj estas malligitaj. Ekster la haveno, pro maltrankvila vetero, ŝipo **tangas** se ŝi ricevas ŝvelon de antaŭe aŭ poste; ĝi **ruliĝas** se de flanke.

Velŝipo, se la vento estas kontraŭa aŭ malfavora, devas **boardi**—aŭ verde boardi aŭ ruĝe boardi—t.e. velveturi alvente kiel eble plej multe, alterne kun la vento sur la verda kaj ruĝa flankoj. La ruĝa (maldekstra) flanko kaj la verda (dekstra) flanko estas tiel nomitaj pro la koloroj de la lumoj kiujn oni dumnokte starigas. ***Vejri** estas turni la ŝipon tiel, ke la vento blovas de la alia flanko. Oni kutime vejras la pruon ventantaŭe, sed okaze oni devas vejri ventposte. **Lofi** estas direkti sin pli al la vento. **Mallofi** direkti sin for de la vento. **Gibi** estas turni bumon aŭ jardon de unu flanko ĝis la alia.

Pro maŝina difekto aŭ senmastiĝo ŝipo **drivas** kaj eble surteriĝas aŭ ***grondas**, kaj rompiĝas, aŭ pereas per ŝtormo, renversiĝante aŭ alfundirante.

4. ADMINISTRADO KAJ ORGANIZO DE ŜIPOJ

Admiralitato : la organizaĵo kiu komandas militŝiparon kaj personaron.

Divizio/Eskadroparto : subdivido de eskadro.

Eskadro : kelkaj ŝipoj, boatoj, aviadiloj aŭ iaj veturiloj, sub la komando de admiralo aŭ supera oficiro.

Eskortanto/Eskortŝipo : militŝipo kiu defendas eskortaĵon.

***Floteo** : kelke da eskadroj sub la komando de admiralo aŭ supera oficiro.

Konvojo : kelke da komercaj ŝipoj sub la komando de supera oficiro.

Militŝiparo : ĉiuj militŝipoj de nacio.

Mararmeo : la ŝipanoj kaj aliaj personoj, kiuj plenigas la militŝiparon.



5. SPECIOJ DE ŜIPOJ, BARKOJ, BOATOJ,

Ĉar la specoj de navigeblaj flosiloj estas sennombraj, estas malfacile difini la diversajn specojn. Dum la longa historio de ĉiu speco oni nomis malsimilajn specojn per sama nomo en sekvantaj tempoj. Aliaj nacioj alprenis la samajn nomojn, sed ne ĉiufoje donis la nomon al tute sama speco. Mallonge dirite, ĉu nacilingve ĉu Esperante, difinoj estas ofte ne tute ĝustaj. Mi tial proponas la sekvantan larĝan dividon de specoj, bazitan sur la diferencoj en maniero de veturigo. Ĉe (1) oni ankaŭ rimarku, ke tiu kategorio estas ĝenerale pli granda ol la ceteraj.

1. **Ŝipo** : tia, kia estas nuntempe pelata per maŝino, aŭ vapora aŭ disela motoro : **Vaporŝipo**, **Motorŝipo**, **Poŝtŝipo**, **Militŝipo**, **Kargoŝipo**, **Plezura ŝipo**, sed ankaŭ **velŝipoj**, la plej granda speco de barkoj.
2. **Barko** : tia, kia estas kutime pelata per veloj, ĉu kun ĉu sen motoro : **Fiŝbarko**, **Jakto**, **Kutro**, k.s.
3. **Boato** : tia, kia estas sufiĉe malgranda esti pelata per remiloj, aŭ kun aŭ sen motoro, veloj : **pinaso**, **savboato**, **konkursa boato** k.s.




Fig. 1

1. **Sipoj** bordŝipo, kargoŝipo.
2. **Barkoj** jakto (jolo), daŭo, kutro.
3. **Boatoj** pinaso, gigo, savboato, balenboato, boateto. Konkursa remboato, Boataro ŝraŭbe remanta/boatano *julas per *julo.
4. **Kanotoj** kanada kanoto, kajaka kanoto.
5. **Pramoj** (transira) pramo, plezura prameto.

4. **Kanoto** : tia, kia estas kutime pelata per padeloj, kun aŭ sen veloj: **kanada kanoto, kajako, faldkanoto, milita kanoto.**

5. **Pramo** : tia, kofro-simila, kia estas kutime trenata, aŭ pelata per puŝtango; **karga pramo, plezura prameto.**

Maristoj ofte nomas ŝipojn k.s. laŭ aparta eco, ekz. **ĉasanto** (kontraŭ submarŝipoj aŭ balenoj), **tranĉanto** kiu tranĉas la ondojn.

Militŝipoj

Batalŝipo : la plej potenca, plej kirasita speco de militŝipo. (**Drednaŭto**)—kio signifas Angle *timu nenion*—estas la nomo de la unua ŝipo de batalŝipa klaso.

Aviadila ŝipo : ŝipo konstruita por portado kaj forflugado de aviadiloj.

Krozŝipo : ŝipo kutime uzata por protekti aŭ ataki komercajn ŝipojn aŭ por skoltado. **Batalkrozŝipo** : krozŝipo armita preskaŭ tiel potence kiel batalŝipo, eble pli rapida, sed ne tiel forte kirasita. **Helpa krozŝipo** : komerca ŝipo armita kaj uzata kiel krozŝipo.

Destrojero : tre rapida, nekirasita ŝipo armita per torpedoj kaj malpli pezaj kanonoj.

Korveto : ne tiel rapida kiel destrojero kaj ne portanta torpedojn.

Submarŝipo : ŝipo kiu povas naĝi tute submergiĝinte.

Monitoro : malprofunda ŝipo kun relative grandaj kanonoj uzata en malprofundaj maroj kaj riveroj.

Ĉasanto : tre rapida ŝipeto armita per malpezaj kanonoj kaj submaraj bomboj.

Torpedoŝipo : tre rapida ŝipeto armita ĉefe per torpedoj.

Patrolŝipo : malpli rapida ŝipo por patrola deĵoro.

Minsema ŝipo : ŝipo kiu semas aŭ demetas minojn.

Minbala ŝipo : ŝipo kiu balaas aŭ forprenas minojn.

Surteriĝa ŝipo : barĝo aŭ boato; iu aparte konstruita por surteriĝi soldatojn, veturilojn k.s.

Flagŝipo : la ŝipo kiu flirtigas la flagon de admiralo aŭ supera oficiro.




Fig. 2 Kargoŝipo

- | | |
|--|--------------------------------------|
| 1. Butono de antaŭa masto. | 26. Oleuoj kaj akvujoj en la kareno. |
| 2. Signaljardo. | 27. Kilo. |
| 3. Anteno radia. | 28. Varangoj. |
| 4. Flago de kompanio. | 29. Fumtubo. |
| 5. Postmasto. | 30. Ventkapuĉo. |
| 6. Gafo. | 31. Davito. |
| 7. Nesto (Observejo). | 32. Savboato. |
| 8. (Antaŭa) Topmasta stajo. | 33. Kompasejo. |
| 9. Antaŭmasta stajo. | 34. Pilotejo, radejo. |
| 10. Lifto de kargobumo. | 35. Navigejo, ponto. |
| 11. Hokŝnuro. | 36. Ĉambraro. |
| 12. Kargo-levbumo. | 37. Ŝtuparo. |
| 13. Flaga hisilo. | 38. Kaldronejo. |
| 14. Postmastaj vandoj. | 39. Maŝinejo. |
| 15. Antaŭa flagstango. | 40. Kaldrono. |
| 16. Nacia flago. | 41. Maŝino. |
| 17. Steveno/Antaŭkilo. | 42. Tunelo de ŝafto. |
| 18. Anko kaj (interne) Antaŭa kastelo. | 43. Helica kadro. |
| 19. Fakmuro, vando. | 44. Helico/Sraŭbo. |
| 20. Antaŭparto. | 45. Direktilo/*Rudro. |
| 21. Pavezo ĉirkaŭ la antaŭa ferdeko. | 46. Postaĵo, Posta parto. |
| 22. Ferdekaj pordoj al holdoj. | 47. Ferdeka ĉambro/rufo. |
| 23. Malsupra ferdeko. | 48. Anka vinĉo (sur la pruo). |
| 24. Orlopa ferdeko/Orlopo. | 49. Akvolinio. |
| 25. Interna kareno. | 50. Meza kastelo. |

Komercaj Ŝipoj

Pasaĝera ŝipo : ŝipo kiu portas pasaĝerojn.

Kargoŝipo : ŝipo kiu portas kargon/ŝarĝon.

Poŝtŝipo/Kuriersŝipo/Pakŝipo/(Pakboto) : ŝipo kiu portas poŝtajojn.

Transporto. Transporta ŝipo : ŝipo kiu portas militistojn

Oleoŝipo : ŝipo aparte konstruita por porti oleon/benzinon.

Bordŝipo : ŝipo kutime vojaĝanta proksime de la bordo.

Plezurŝipo : ŝipo pasaĝera uzata por plezuro.

Vaga ŝipo : *Trampo : ŝipo kiu vojaĝadas de loko al loko laŭ la postulo de kargo.

Malvaga ŝipo/Linia ŝipo : ŝipo kiu vojaĝadas laŭ regula vojaĝplano.

Fiŝkaptadaj ŝipoj, Barkoj, k.s.

(Balen)rafina ŝipo : granda ŝipo sur kiu oni eligas oleon el balenoj.

(Balen)ĉasŝipo : malgranda ŝipo kiu ĉasas balenojn.

***Trola/Skrapreta ŝipo/barko** : ŝipo kiu trenas reton laŭ la marfundo.

Flotreta, Drivreta ŝipo/barko : tiu kiu fiŝkaptas per longaj retoj.

Sejna ŝipo/barko : tiu kiu fiŝkaptas per sejnaj retoj.

Hoka barko/boato : tiu kiu fiŝkaptas per fadenoj kaj hokoj.

Diversaj ŝipoj kaj Barkoj

Hospitala ŝipo : por vunditoj kaj malsanuloj.

(Telegraf)kabla ŝipo : ŝipo konstruita por ripari kaj demeti telegrafkablojn.

Regajna/Savada ŝipo : ŝipo uzata por postsavi pereintajn ŝipojn.

Glacirompa ŝipo, Glacirompanto : ŝipo konstruita por rompi glaciojn kaj fari *ŝanelon por aliaj ŝipoj.

Trenŝipo : malgranda potenca ŝipo por trenadi aliajn ŝipojn kaj gabarojn k.c.




Fig. 3. Velŝipoj kaj Barkoj

- | | |
|--------------------------|---------------------------------------|
| 1. Barko (trimasta) | 5. Skuno (kun bermudaj veloj). |
| 2. Barkskuno/Barkentino. | 6. Skuno kun laŭlarĝaj top-
veloj. |
| 3. Brigo. | |
| 4. Brigskuno/Brigantino. | |

Transira ŝipo/boato/pramo : por transiri tien kaj reen, markolon, havenon aŭ riveron k.s.

Jakto : ŝipo, barko aŭ boato uzata por plezuro. **Konkurjakto** : jakto por konkurso. **Krozjakto** : por veturado.

Hidroplano : rapida ŝipeto kun ŝtupo aŭ ŝtupoj en platforma kareno.

Lumŝipo : ankrita ŝipo kun lumturo por montri rifojn, sablaĵojn, k.s.

Dragŝipo : kun sitelegaro kaj **Suĉa ŝipo** kun suĉilo por formovi sablon aŭ ŝlimon el ŝanelo.

Buŝipo/boato/pramo : aparte uzata por levi ***buojn** aŭ helpi ŝipon alligiĝi al buo.

Bargo : Platkarena, malalta, kargoporta barko aŭ ŝipo uzata ordinare en riveroj, havenoj kaj kanaloj.

Gabaro/(Ŝarg-)/(Kargo-)pramo : simila al bargo sed tute mankas al ĝi veloj kaj maŝinoj.

Atendantanto : ŝipo, barko, aŭ boato kiu portas pasaĝerojn, ŝipanojn, provizaĵojn k.s. al pli granda ŝipo.

Ŝalupo : malgranda ŝipo aŭ barko por ĝenerala laboro en havenoj aŭ riveroj.

Ŝipkorpo : eluzita ŝipo, tenejo por karbo, pulvo k.s.

Forlasito : vaganta aŭ grondinta ŝipo forlasita de sia ŝipanaro.

***Vrako/Ŝippereajo/Ŝipruino** : ŝipo rompe surterigita.

Ĝemela ŝipo : ŝipo tute simila al alia.

Trejna ŝipo : ŝipo por **trejni*** (t.e. teknike instrui) junajn maristojn.

Velŝipoj kaj barkoj

Praepokaj ŝipoj :

Biremo, Triremo, Kvadremo, Kvinkveremo : mezmaraj ŝipoj kun du, tri, kvar, kvin, vicoj da remiloj.

Longŝipo, Drakŝipo : Nordlandaj remŝipoj.

Mezepokaj ŝipoj :

Karako, Galiono : plej grandaj specoj de ŝipo.

Karavelo : malpli granda speco de ŝipo.

Galero : remŝipo.

Militŝipoj de la lastaj jarcentoj:

Batalŝipo : granda ŝipo kun pli ol unu ferdeko kun kanoj. **Triferdekulo, Dufferdekulo.**

Fregato : ŝipo kun unu ferdeko kun kanoj, kiu funkcias simile al moderna krozŝipo.

Korveto : ŝipo pli malgranda ol fregato.

Kapersŝipo : neregistara ŝipo, al kiu estas donita de registaro aŭ reĝo permeso kapti ŝipojn de alia nacio.

Tranĉanto, *Klipero : rapida ŝipo tiel nomita ĉar ĝi tranĉas la ondojn.

Balensŝipo : ŝipo kiu ĉasas balenojn.

Velŝipoj estas ankaŭ nomataj laŭ siaj rigadoj :

Fregato/Plenriga ŝipo : kun tri aŭ pli da mastoj kun laŭlarĝaj veloj sur ĉiu.

Barko : kun tri aŭ pli da mastoj kun laŭlarĝaj veloj sur ĉiu krom la plej posta, kiu portas laŭlongajn velojn.

***Barkentino/Barkskuno** : kun tri aŭ pli da mastoj, kun laŭlarĝaj veloj sole sur la antaŭmasto.

Brigo : kun du mastoj, ambaŭ kun laŭlarĝaj veloj.

Brigantino/Brigskuno : kun du mastoj, kun laŭlarĝaj veloj sur la antaŭa.

Skuno : kun du aŭ pli da mastoj kun laŭlongaj veloj.

Jolo : kun du mastoj, ambaŭ kun laŭlongaj veloj, kaj kun la posta masto malpli alta ol la antaŭa. (Dumasta skuno portas la postan maston egalalte aŭ pli alte ol la antaŭmasto).

Kutro : kun unu masto.

(**Slupo**) : kun unu masto sed sen busprito.

Boatoj

Ni nomas **larĝa** boaton en kiu du remantoj povas sidi sur ĉiu rembenko, ĉiu tenante remilon, **mallarĝa** boaton en kiu nur unu remanto sidas sur ĉiu rembenko. Ia speco povas esti Motorboato kun aŭ sen veloj kaj remiloj.

Boatoj de ŝipo kaj marbordo

Pinaso : larĝa boato longa dek metrojn aŭ pli, kun nepinta postajo.




Fig. 4. Barkoj

1. Jolo (jako kun bermudaj veloj).
2. Jolo (velbargo kun sprit-veloj).
3. Kutro (jako).
4. Lugro (fiŝbarko).
5. Daŭo (kun latinaj veloj).
6. Jonko.




Fig. 5. Barko

(Ĉi tia barko estas krome kutro kaj jakto)

- | | |
|--|------------------------|
| 1. Kluba flago. | 13. Gafo. |
| 2. Butono de masto. | 14. Ĉefvelo/Grandvelo. |
| 3. Topmasta stajo. | 15. Lifto. |
| 4. Ĵibo. | 16. Posta stajo. |
| 5. Antaŭvelo/Antaŭa stajvelo. | 17. (Vantoj) Stajoj. |
| 6. Transstango etendiganta la topmastajn vantojn/stajojn | 18. Bumo. |
| 7. Busprito. | 19. Ŝkoto. |
| 8. Busprita stajo. | 20. Direktila stango. |
| 9. Fokeno-frapilo. | 21. Kajuta tegmento. |
| 10. Pruo. | 22. Postaĵo. |
| 11. Topvelo. | 23. Sidejo. |
| 12. Pinta hisilo (la forka hisilo ne estas montrata). | 24. Kajuto. |
| | 25. Direktilo/Rudro. |
| | 26. Kilo. |

Gigo : mallarĝa boato simila al, sed ofte malpli granda ol pinaso.

Balenboato : Mallarĝa boato, longa malpli ol 10 metrojn kun pinta postaĵo.

Boateto : boato malpli longa ol 5 metrojn.

Floso : ofte estas portataj de ŝipo por vivsavado. Floso kutime enhavas aerplenajn kestojn.

Savboato : larĝa boato kun pinta postaĵo kaj aerplenaj kestoj por pligranda flospovo.

Boatoj k.s. de rivero

Kutime endomigataj en boatremizo aŭ boatejo

Konkurboato, Konkursa remboato : tre malpeza boato, ofte kun glitaj sidiloj, por konkursoj.

Plezurboato : malpeza boato konstruita por plezuro.

Kanoto : pintfina mallarĝa flosilo pelata per padelo.

Kanada Kanoto simila al tiuj faritaj de nordamerikaj Indianoj. **Kajako**, kanoto simila al la eskimaj kanotoj, pelata per du-ala padelo.

Faldkanoto : farita el, ekzemple, kanvaso sur ligna framo.

Prameto : Rektlinia flosilo kutime pelata per longa stango.

Koraklo : boateto farita el ligna framo kaj fela aŭ kanvasa kovrilo.

Barkoj, boatoj kaj kanotoj de ne-eŭropaj specoj

La flosiloj supre menciitaj estas ĉefe Eŭropaj specoj. Sekvas aliaj konataj de Eŭropanoj.

***Daŭo** : barko de araba speco kun latinaj veloj.

***Feluko** : boato de Mezmara speco kun latina velo.

***Jonko** : barko de ĉina speco kun veloj kaj multaj stangetoj.

***Sampano** : Orientlanda boato ofte pelata per ***julo** (posta remilo).

Gondolo : Venezia boato.

Pirogo : kanoto farita el kavigita trunko.

6. ŜIPKONSTRUO

La korpo aŭ ŝelo de la ŝipo estas konstruata sur framo/skeleto el reloĵoj, al kiuj lignaj tabuloj estas najlataj, aŭ ŝtalaj lamenoj estas vinktataj aŭ kunforĝataj/veldataj. La skeleto havas la **kilon** laŭlonge de la **kareno**. Laŭ la supro de la kilo kaj interne de la kareno estas la kilsono. Al la antaŭa fino de la kilo kaj **kilsono** estas fiksata la (antaŭ) **stevano/antaŭkilo**, kaj al la posta fino la (post) **stevano/posta kilo** aŭ **helica kadro**. Trans la kilo estas la **ripoj** aligataj ĉe la supro transe per traboj kaj laŭlonge per laŭlongaj traboj. Ĉe la malsupro **varangoj** transe aligas kaj subtenas la internan karenon al la ekstera kareno (ĉar ŝipoj kutime havas duoblan fundon), kiel la kilsono faras laŭlonge. **Kolonoj** aligas la trabojn al la interna kareno kaj subtenas ilin.

Al la ripoj la **tabuloj** aŭ **ŝellamenoj** estas fiksataj; al la traboj la ferdeko aŭ ferdekoj. **Fakmuroj/Vandoj**, internaj muroj el ŝtalo aŭ ligno, dividas la ŝipon en ofte netrafluetajn fakojn. **Cisterno** estas rezervujoj por akvo aŭ oleo.

Ferdeko kelkfoje estas nomata per la literoj A, B, C, D, k.s. Ŝipo de kvar ferdekoj havas: supran ferdekon, mezan, malsupran kaj (plej malsupre) **orlopon/orloperdekon**.

Super la supra ferdeko ofte troviĝas ferdekoj etendiĝantaj nur laŭ parto de la ŝipo. En mezepokaj ŝipoj oni havis **antaŭkastelon**, **mezkastelon** kaj **postkastelon**. Poste oni havis antaŭkastelon aŭ antaŭparton kaj ankaŭ duonferdekon etendiĝantan de la ŝipmezo posten. Super la duonferdeko estas pli mallonga kvaronferdeko kaj super tiu, kaj plej mallonge, la **poŭpo**. Ĉiuj terminoj estas uzataj hodiaŭ. Krome, kanonferdeko, flugferdeko, boatferdeko, pontferdeko, promena ferdeko, testuda ferdeko.

Tiel, inter la ekstera kaj interna karenoj troviĝas balastujoj, super la interna kareno holdoj, inter la ferdekoj **interferdekoj**, super la ferdeko **superpartoj** ekz. **antaŭkastelo/teŭgo**, (mez)kastelo, postkastelo/poŭpo. Sur la supra ferdeko aŭ mezkastelo ofte estas konstruataj, **rufoj** (kiuj ne etendiĝas ĝis la flankoj de la ŝipo).

Ŝipaj partoj iaforte estas nomataj laŭ anatomiaj terminoj. Ekz. la **beko**, kiu eble portas antaŭfiguron; la **kapo** aŭ **kapuso**; **ŝultroj**; la **talio**, la mezparto (precipe se ĝi estas malpli supra ol la fino); **ventro** kaj **postajo**.




Fig. 6. Ŝipkonstruo

- | | |
|----------------------------|---------------------------------------|
| 1. Boatferdeko. | 14. Ripoj. |
| 2. Supra ferdeko. | 15. Lamena ripo/Ripego. |
| 3. Malsupra ferdeko. | 16. Angula lameno. |
| 4. Orlopa ferdeko/Orlopo. | 17. Kolono. |
| 5. Ferdeka ĉambro. | 18. Holdo. |
| 6. Fenestro. | 19. Interna kareno. |
| 7. Kadro de ferdeko pordo. | 20. Ekstera kareno. |
| 8. Davito. | 21. Kilsono. |
| 9. Kuseno. | 22. Kilo. |
| 10. Gardrelo. | 23. Flanka kilsono. |
| 11. Pavezo. | 24. Varango (inter oleujo aŭ akvujo). |
| 12. Ŝelero/Ŝelplato. | 25. Flanka kilo/Bilĝa kilo. |
| 13. Trabo. | |

Boatkonstruo

Krom la supre menciitaj partoj estas **rembenkoj** por la remantoj kaj **piedtabuloj** por iliaj piedoj; **remilingoj** kaj **remilapogiloj** por la remiloj en la **boatrando**; **hokstango** por teni aŭ forpuŝi la boaton; **karenaj tabuloj** aŭ **kradoj** interne de la kareno; **postaj benkoj** por pasaĝeroj. Oni movas **direktilon** ***rudron** per **direktila/rudra stango** aŭ **direktila vekto** kaj ŝnuroj.

Kiam la malsupra rando de la tabuloj de la boatkorpo kuŝas sur la supra rando de la apuda tabulo, oni nomas la konstruon **klinka**, se ne, oni nomas ĝin **karavela**.

7. MAŜINARO

Specoj : **Movalterna**, **Turbina**; kun aŭ sen reduktiloj (**Interne brula**) **Motora**, **Disela**. Ankaŭ **turbinelektra**, **diselektra**.

Vaporo estas produktata en **kaldronoj**, ĉu hejttubara ĉu akvotubara per brulado de karbo aŭ oleo. **Karbizi** kaj **Oleizi** (provizi je karbo aŭ oleo), enŝipigi brulaĵon en karbujojn kaj oleujojn. La kaldronoj kutime troviĝas en aparta **kaldronejo**.

En la **maŝinejo** kutime estas ankaŭ helpaj maŝinoj, ekzemple : **dinamoj**, **pumpiloj**, **kondensiloj**, **ventumiloj**, **elvaporigiloj**.

La maŝino turnas **ŝafton**, kiu iras tra **puŝportilo**, **lagroj** kaj **postaja tubo**, kaj turnadas **helicon/ŝraŭbon** kun 2, 3, aŭ 4 aloj. La teoria antaŭena movo de la helico dum unu turniĝo estas ĝia **paŝo**; la diferenco inter tio kaj la efektiva movo estas nomata la **glito**, kutime esprimata en procentoj.

Kelkaj malprofundaj nuntempaj ŝipoj havas, kaj la plej fruaj vaporŝipoj havis, **padelradojn**.

Ĉevalpovo: la unuo por esprimi la potencon de maŝino, havas valoron de 75 kilogrammetroj (aŭ 550 futfuntoj) ĉiusekunde.

8. PARTOJ, EKIPAĴOJ KAJ ILAROJ DE ŜIPO

***Alportulo** : ŝnuro kiun oni elsendas por entiri pli grandan ŝnuron.

Ankro : la peza ilo per kiu ŝipo sin tenas ĉe la marfundo; kutime alligita al ĉenego kaj levata-mallevata per **kapstano** aŭ **ankra vinĉo**. Specoj de ankro : **ŝtoka**, **neŝtoka**, **soka**.

Ankre flosi : oni faligas ankron en ankrejo, poste forlasas pli da ĉeno, tiam haltigas ĝin per bremsa aŭ kunprenilo. Kiam la ankro hokiĝas ĉe la fundo kaj la ĉeno streĉiĝas la ŝipo ankrigas. Povas okazi, ke la ankro malhokiĝas, kaj la ŝipo drivas. Oni povas faligi duan ankron tiel, ke la ŝipo estas duoble ankrita. Por eviti ĉenvolvajn oni iafoje enmetas turnringon. Por levi la ankron oni funkciigas la kapstanon aŭ ankro-vinĉon, la ĉeno iĝas vertikala, la ankro malhokiĝas, elakviĝas kaj fine kuŝas en la ĉentubo. **Flosankro**: uzata ĉemare dum malbona vetero.

Anteno : la metala fadeno per kiu radiaj signaloj estas elsendataj aŭ ricevataj.

***Asdiko** (angle *asdic*) aparato por eltrovi submergintan submarŝipon.

(**Baborda**) : la maldekstra(ruĝa) flanko de ŝipo kiam oni rigardas antaŭen. (Nedezirinda vorto pro trosimileco al *triborda*).

Balasto : io peza uzata por stabiligi ŝipon.

Baldakeno : kanvasa tuko streĉita kontraŭ la sunvarmo aŭ pluvo.

Barbedo : kirasita ejo sur kiu kanono aŭ kanona tureto estas lokita.

Bilĝo : la kurba parto de la kareno kaj tial tiuj partoj, aŭ ujoj, en ŝipa fundo, kie akvo kolektiĝas.

Binoklo : dutuba optika instrumento, kiu pligrandigas la aspekton de malproksimaj objektoj.

Bito : du mallongaj stangoj sur bazo de ferdeko por fiksi ŝnurojn.

Biteto : pli malgranda stango meze vinktitaj en boato aŭ ŝipo por fiksi ŝnurojn. Vidu **Pinglego**.

Blokhaŭso : kurasita ĉambro por la direktado de militŝipo.

Bolardo : dika fosto por ligi ŝnurojn.

Davito : unu el paro de kurbaj stangoj uzataj por levi aŭ mallevi boaton. Davitoj turneblaj, radiaj kaj mallevaj.

Direktilo/***Rudro** : vertikala plato aŭ tabulo, kutime ĉarnirfiksita al la posta steveno, per kiu la ŝipo estas direktata.

Direktila/Rudra Rado : Direktila/Rudra Stango.




Fig. 7. Flagoj k.c.

- | | |
|---|------------------|
| 1. Flago ("U" de la Internacia Signalaro). | 7. Biteto. |
| 2. Triangula flago ("2-a Anstataŭaĵo" de I.S.). | 8. Bito. |
| 3. Forka flago ("B" de la I.S.). | 9. Ŝeklo. |
| 4. Forka flago (Subadmirala flago). | 10. Pulioj. |
| 5. Flagrubando (la "Kom-preninta" de la I.S.). | 11. Maŝa spliso. |
| 6. Pinglego. | 12. Ŝnuro. |
| | 13. Hoko. |
| | 14. Kapstano. |
| | 15. Vinĉo. |

Dismeto/Akvodismeto : la pezo de la akvo dismetata de flotsanta ŝipo kaj sekve la pezo de la ŝipo mem.

Drivaj tabuloj : tabuloj malleveblaj sur la flankoj de velbargoj k.s.

Ferdeka pordo : aperturo en ferdeko tra kiu oni enmetas pakajojn en holdojn.

Fumtubo : tubo tra kiu la fumo de kaldronoj k.s. eliĝas.

Fluejo : tubo aŭ aperturo por ellasi akvon for de la ferdeko.

Gardkuseno, Gardilo : protektilo farita el bulo kun ligŝnuro, por gardi la flankon de ŝipo kontraŭ kolizio kun kajo k.s.

Gardrelo : relo ĉirkaŭ ferdeko.

Graplo : ilo farita el hokoj kaj ŝnuro per kiu oni povas hoki kion ajn sub la akvo. Iafoje uzata anstataŭ ankro.

Hamako : kanvasa, pendigebla, volvebla lito.

Handspiko : forta ligna aŭ fera stango uzata kiel levilo.

Harpuno : jeta lanco uzata en balenkaptado.

Holdo : ĉambrego aŭ fako en ŝipo kien oni metas kargon,

Kajuto : ĉambro de barko, por ŝipanoj aŭ pasaĝeroj.

Kalfatri : vidu Peĉdoni.

Kapstano : turnmaŝino sur vertikala akso por levi ankron. ŝnuron k.s.

Levbumo/Kargobumo : forta stango por enŝipigi kaj elŝipigi kargon k.s. Ĝia rigilaro estas : **lifto** por suprenlevi la pinton; **braso** por turni ĝin; **hokŝnuro/kargoŝnuro** por levi kaj mallevi pakajojn k.s.

Ligŝnuro : ia mallonga ŝnuro por ligi aŭ fiksi ion.

Metacentro : la renkonta punkto tra kiu pasas la vertikalaj rektoj de la puŝcentroj rilate al la ŝipo rekta kaj kliniĝinta (nur malmulte). Kiam la metacentro troviĝas super la pezocentro la ŝipo estas stabila.

Minio : ruĝkolora plumba koloraĵo ŝmirata sur nuda fero kaj ŝtalo por malhelpi ruston.

Municiejo : provizejo por obusoj kaj kartoĉoj.

Navigejo : platformo, ferdeko aŭ ĉambro, kie oni estradas la manovron de ŝipo.

Nesto : observistejo ĉe la mastosupro.

Olea vesto, Olea ĉapelo : nepenetreblaj vestoj portataj kontraŭ malseka vetero.

Pavezo : gardilo kontraŭ ondoj, ĉirkaŭ ferdeko.

Peĉdoni/Kalfatri : per varma peĉo kaj ŝnurtaŭzaĵo fari lignan ferdekon netrafluebla.

Periskopo : elrigarda aparato por submarŝipoj.

Pinglego : mallonga dika bastono, meze fiksita, por fiksvolvi ŝnuron.

(Ponto)/Komandejo : transversa supra platformo sur kiu oni komandas la manovron de ŝipo.

Postenizi/Homizi : asigni postenojn aŭ provizi homojn al boato, kanono, k.s. por funkciigi ĝin.

Pruo : la plej antaŭa parto de ŝipo.

Ramo : elstara antaŭa parto de ŝipkorpo por fari subakvan truon en la flanko de malamika ŝipo.

Salono : plej granda ŝipĉambro por manĝado k.s.

Savbuo : ringe aŭ huffere formita flosaĵo.

Savjako, Savzono : flospova vestaĵo, plenigita de aero, korko, aŭ kapoko (tre malpeza fibro).

Savŝnuro : ŝnuro fiksita por helpi preterirantojn, kiuj alie eble falus pro balanciĝo de ŝipo aŭ boato.

Stivlignaro, Stivtrabaro : lignaĵaro por protekti kaj fiksi kargon en holdo.

Submara bombo : bombo kiu eksplodas sub la surfaco de la maro.

Ŝarĝlinio : linio desegnita sur la flanko de komerca ŝipo, ĝis kiu oni povas enakvigi la ŝipkorpon.*

Ŝeklo : aligilo por ĉenoj k.s. **Ŝekli** : aligi ion per ŝeklo. **Malŝekli**.

Ŝnurringo : ringo por levi pakajojn kaj por multaj aliaj celoj.

Teleskopo : unutuba optika instrumento, kiu pligrandigas la aspekton de malproksimaj objektoj.

Tonelaĵo, Tuta Tonelaĵo : la tuta volumeno de la interno de la ŝipo. **Neta Tonelaĵo** : la volumeno nur de la mongajnaj spacoj. Volumeno estas kutime esprimata per toneloj (ĉiu havas 100 kubajn futojn : 2.83 kubajn metrojn).

Torpedo : maŝine pelata eksplodaĵo, pafata el **torpedingo/torpeda tubo**.

(Triborda) : la dekstra (kiam oni rigardas antaŭen) flanko de ŝipo. (Ne dezirinda pro voĉa/sona simileco al **baborda**).

Tunaĵo, Portebla Tunaĵo : la nombro de tunoj da kargo portebla de ŝipo. (2. Tunaĵo), Ŝippezo, Akvodismeto : la metra tuno de 1,000 kg. estas proksimume egala al la angla tuno de 2240 funtoj (=1016 kg.).

Tureto : kurasita turnebla ejo por kanonoj kaj kanonistaro.

Venta Flanko : la flanko de ŝipo, proksima al la vento. **Malventa Flanko**.

(Vent)kapuĉo : turnebla metala ventkaptilo por ventoli la ŝipinternon, precipe la kaldronejon kaj maŝinejon.

Vinĉo : levmaŝino kun horizontala akso. **Ankra Vinĉo** kun ĉentamburo aparte uzata por levi ankron.

9. VELOJ KAJ RIGILARO

Rigo : la aranĝo de mastoj kaj veloj kaj ŝnuraro en ŝipo, barko aŭ boato. **Rigi** : ordigi mastojn, jardojn kaj ŝnurojn.

Nomoj de mastoj:—

Dumastulo : ŝipo kun du mastoj : antaŭa kaj posta.

Trimastulo : ŝipo kun tri mastoj : antaŭa, meza/(granda), posta.

Kvarmastulo : ŝipo kun kvar mastoj : antaŭa, meza, posta, plejposta.

Mastoj el pli ol unu peco :

Mastoj el du pecoj : **malsupra masto, topmasto**.

Mastoj el tri pecoj : malsupra masto, topmasto, **brammasto**.

Butono : la malgranda rondaĵo ĉe la supro de masto.

Topo : la platformo fiksita al la malsupra masto ĉe la malsupro de la topmasto.

Transversaj Stangoj : etendiloj fiksitaj apud la supro de mastpeco por etendi la transversajn stajojn. Sur la malsupra masto ili portas la topon.

Busprito : la forta stango kiu elstaras antaŭe de la ŝipo.




Fig. 8. Veloj de Fregato

- | | |
|------------------------------|------------------------------|
| 1. Fora jibo. | 16. Meza reĝvelo. |
| 2. Meza jibo. | 17. „ supra bramvelo. |
| 3. Proksima jibo. | 18. „ malsupra bramvelo. |
| 4. Antaŭa topmasta stajvelo. | 19. „ supra topvelo. |
| 5. Antaŭa reĝvelo. | 20. „ malsupra topvelo. |
| 6. „ supra bramvelo. | 21. „ velo. |
| 7. „ malsupra bramvelo. | 22. Posta bramasta stajvelo. |
| 8. „ supra topvelo. | 23. Posta topmasta stajvelo. |
| 9. „ malsupra topvelo. | 24. Postmasta stajvelo. |
| 10. „ velo. | 25. Posta reĝvelo. |
| 11. „ topa alavelo. | 26. Posta bramvelo. |
| 12. Meza bramasta stajvelo. | 27. „ supra topvelo. |
| 13. Meza topmasta stajvelo. | 28. „ malsupra topvelo. |
| 14. Mezmasta stajvelo. | 29. „ gafvelo. |
| 15. Meza ĉielvelo. | |

Bumbusprito : malpli dika stango elstaranta preter la busprito.

Jardo : transversa velstango al kiu la supra rando de velo estas fiksita. Oni nomas ilin laŭ la masto ĉe kiu ili pendas :

(de malsupre)	Antaŭa,	Meza	aŭ	Posta	jardo
„	„	„	„	„	topjardo
„	„	„	„	„	bramjardo
(malofte)	„	„	„	„	reĝjardo
„	„	„	„	„	ĉieljardo

Gafo : mallonga jardo kun forko ĉe unu pinto, kiu ĉirkaŭtenas maston.

Bumo : velstango sub la malsupra rando de velo.

Martingalo/Fokeno-frapilo : vertikala stango sub la busprito.

Veloj

Veloj faritaj el kanvaso, velŝtofo, fortigita ĉirkaŭ la rando per ŝnura **raliko** kun, ĉe la anguloj, **ralikringoj**.

Laŭlarga Velo : kvarranda velo kiu etendiĝas transverse de masto ĝis ambaŭ flankoj. Oni nomas ilin simile al la jardoj : antaŭa velo, antaŭa topvelo, antaŭa bramvelo, antaŭa reĝvelo, antaŭa ĉielvelo k.s.

Laŭlongaj veloj :

Gafa Velo : velo etendiĝanta post masto sub gafo kaj ofte super bumon. Oni nomas ilin laŭ la masto al kiu ili estas hisitaj : antaŭvelo, mezvelo, postvelo. En unumasta barko : ĉefvelo/grandvelo.

Gafa Topvelo : kutime triangula velo etendiĝanta super gafa velo.

Lugra Velo : velo fiksita al jardo pendanta laŭlonge.

Latina Velo : velo fiksita al tre longa jardo pendanta laŭlonge, ekzemple, sur feluko.

Spritvelo : velo subtenata de stango, nomata sprito, kies unu pinto estas fiksita al la malsupra parto de masto kaj la supra pinto ĉe la posta supra angulo de la spritvelo.

***Spinako** : triangula velo kelkfoje etendiĝanta sur la kontraŭa flanko al ĉefvelo.

Jibo : triangula velo antaŭ la antaŭmasto.

Stajvelo : triangula velo hisata sur stajo, nomita laŭ tiu stajo, ekzemple, meza topmasta stajvelo.

Bonedvelo : aldona velo etendebla sub aŭ preter pli granda velo. **Ala Velo** : aldona velo etendebla preter pli granda velo.

Ŝnuraro

Ŝnuroj estas farataj el ŝpinita kanabo, manila fibro, sisal-fibro, ŝtalaj aŭ feraj fadenoj. La ŝnurfibroj estas volvataj je fadenoj kaj la fadenoj je ŝnureroj.

Klasifiko de ŝnuroj laŭ dikeco :

Velfadeno : uzata por kudri velojn k.s.

Fiŝfadeno : uzata por fiŝkaptadi k.s., de diversa grandeco.

Ŝnureto : malforta ŝnuro kun malpli ol tri ŝnureroj.

Merleno : ĝudra ŝnureto.

Ŝnuro : kun tri aŭ pli da ŝnureroj.

Ŝnurego/(Haŭsero) : por fiksi ŝipon ĉe kajo aŭ al tren-ŝipo k.s.

Triopa Ŝnuro, Triopa Ŝnurego : tri ŝnuroj volvitaj en unu ŝnuron.

Rigilaro

Senmova rigilaro : subtenas mastojn kaj buspritojn :

Transversa Stajo/(Vanto) : ŝnuro kiu subtenas maston transverse.

Stajo : ŝnuro kiu subtenas maston laŭlonge. **Posta Stajo** : iras posten de la masto.

Subtopaj Stajoj : transversaj stajoj aligantaj topon kaj malsupran maston kaj subtenantaj la tiradon de la topmastaj transversaj stajoj.

Ankaŭ :

Piedŝnuroj : fiksataj sub jardoj kaj busprito kaj ŝnurstupoj sur la transversaj stajoj por faciligi grimpadon.

Savŝnuroj : ŝnuroj fiksataj al difinita loko por helpi preterirantojn.

Mova Rigilaro : la ŝnuroj kaj takeloj por hisi/levi, etendi, brajli, ferli, kaj ĝustigi velojn kaj velstangojn.

Hisilo : ŝnuro aŭ takelo por levi velon, jardon aŭ gafon.

Lifto : ŝnuro aŭ takelo por levi pinton de bumo aŭ jardo.

Braso : ŝnuro fiksita al la pinto de jardo aŭ gafon por ĝustigi ĝin. **Brasi** : ĝustigi la velojn al la vento.

Ŝkoto : takelo fiksita al la posta pinto de bumo aŭ al la posta malsupra angulo de velo por ĝustigi ĝin, ankaŭ al ambaŭ malsupraj anguloj de transversa velo por etendi kaj ĝustigi ĝin. **Ŝkota angulo** (de velo).

Halso : takelo aŭ ŝnuro ĉe la antaŭa malsupra angulo de velo, por plistreĉi la antaŭan randon. **Halsa Angulo** (de velo).

Refi : malgrandigi velon pro troforta vento. **Refiloj** : ŝnureto por ligi faldon en velo.

Brajli : entiri velon ĝis la jardo aŭ masto kiam oni ne volas uzu ĝin. **Angula brajlo, meza/funda/brajlo, flanka brajlo, ĉirkaŭa brajlo.**

Ferli : fiksi brajlitan velon aŭ jardo aŭ bumo per ferlilo.

Ferlilo : maldika ŝnuro aŭ plektaĵo por ĉirkaŭvolvi jardon kaj velon.

Takelo : aparato por levi aŭ streĉi, farita el ŝnuro kaj pulioj. La pulio povas enhavi unu aŭ pli da radetoj, kaj laŭ tio oni nomas ĝin unuopa takelo k.s. Ankaŭ troviĝas tranĉita aŭ malfermebla pulio, hokpulio, vosta pulio k.a.

Splisi : kunigi du ŝnurojn per interplekto de la ŝnureroj. Longa spliso, mallonga spliso, maŝa spliso, retroa spliso.

Nodi : meti nodon en ŝnuron aŭ kunligi ŝnurojn. Refnodo maŝa nodo, mallongiga nodo, duonnodo, turbannodo k.a.

LIBROLISTO

de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

La prezoj estas montritaj laŭ la angla monsistemo:

12 pencoj = 1 ŝilingo

20 ŝilingoj = £1

Oni povas transkalkuli la prezojn en alian monsistemon uzante la kurzon montritan en la enlandaj gazetoj.

Ĉiam aldonu 10% por la afranko, kaj, se dezirata, sufiĉon por registrita sendo.

The Esperanto Publishing Co. Ltd., tute ne vendas librojn rekte al la publiko, sed nur pere de siaj agentoj en diversaj landoj. Oni mendu ilin ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio.

ROMANOJ

La Aventuroj de Marteno Drake. G. Norway. Tradukis el la angla originalo W. Severn. 206 paĝoj. Bindita 5 ŝil.

“Precipe la junuloj englutos ĉi tiun libron. Estas pro tio, ĉar la enhavo estas interesa kaj kortuŝa, kaj la stilo tre simpla.” *La Juna Vivo.*

La Dormanto Vekiĝas. H. G. Wells. Tradukis el la angla originalo A. F. Milward. 212 paĝoj. Bind. 5 ŝil., broŝ. 2ŝ 6p.

“La libro donas bildon pri la vivo en okcidenta Eŭropo post ducent jaroj. La tradukinto liveris meritoplenan laboron.” *Belga Esperantisto.*

Morto de Trajno. Freeman Wills Crofts. Tradukis el la angla originalo Mason Stuttard. 256 paĝoj. Bindita 9 ŝil.

“Tre interesa detektivromano pri dummilita transporto de grava militmaterialo. La eldonejo kaj la tradukinto meritas gratulon kaj grandan legantaron.” *La Praktiko.*

La Naiveco de Pastro Brown. G. K. Chesterton. Tradukis el la angla originalo C. Bean. 256 paĝoj. Bindita 5 ŝil.

Libro en kiu katolika pastro rolas kiel detektivo. “Entute la verko estas tre leginda kaj ni sincere rekomendas ĝin.” *Nia Gazeto.*

Pinokjo. C. Collodi. Tradukis el la itala originalo M. Marchesi. Ilustris W. H. Matthews. 150 paĝoj. Bind. 5 ŝil., broŝ. 2ŝ. 6p.

“Bonega esperantigo de mondkonata libro por knaboj. Plenaĝuloj same kiel geknaboj ne bedaŭros la akiron de tiu bele eldonita libro.” *Belga Esperantisto.*

Romano pri Afrika Bieno. Olive Schreiner. Tradukis el la angla originalo Stephen A. Andrew. 272 paĝoj. Broŝ. 2ŝ. 6p.

“Belajn bildojn pentris la verkistino pri la vivo en Sud-Afriko (antaŭ 50 jaroj). Mallonge, la romano estas unu el la plej rekomendindaj en la Esperanta literaturo.” *Dansk Esperanto Blad.*

Undino. Olive Schreiner. Tradukis el la angla originalo Stephen A. Andrew. 283 paĝoj. Bindita 5 ŝil.

“La libron oni povas rekomendi, precipe por niaj samideaninoj, kiuj povos el ĝi vidi kiel malfacila la vivo estis en la pasinta jarcento por virino iom liberpensema.”
Heroldo de Esperanto.

La Vojo Returne. E. M. Remarque. Tradukis el la germana originalo J. F. Berger. 370 paĝoj. Bindita 5 ŝil.

“Tamen, ĉiuokaze oni legu tiun ĉi libron. La ĉefa afero estas ke Remarque priskribis fenomenojn kiuj certe grave influis je la socia kaj politika evoluo en multaj landoj.”
Norvega Esperantisto.

DRAMOJ

Antonio kaj Kleopatro. W. Shakespeare. Proze tradukita de Stephen A. Andrew. 90 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p.

“Bedaŭrinde, tradukoj tro ofte meritas kritikon se ne mallaŭdon. Des pli plaĉe estas, senhezite povi rekomendi ĉi tiun libreton.”
Esperanto.

Romeo kaj Julieto. W. Shakespeare. Proze tradukita de Stephen A. Andrew. 84 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p.

“Laŭ Esperanta vidpunkto, oni ĝojos pri ankoraŭ unu pruvo de la fleksebleco de la lingvo.”
Esperanto Internacia.

La Gajaj Edzinoj de Windsor. W. Shakespeare. El la angla tradukis Stephen A. Andrew. 90 paĝoj, broŝ. 3ŝ. 6p.

“Entute tre plaĉa kaj rekomendinda libro, prezentanta malfacilan taskon, bonege solvitan de la tradukinto.”
Svisa Espero.

DIVERSAJ VERKOJ

Arboj de la arbaro kaj kampo. Frank Booth. Kun ilustraĵoj de Edith R. Turlington. 40 paĝoj, broŝ. 1ŝ. 9p.

“Tiuj 40 paĝoj en malgranda formato estas perleto. Tia libro estas paŝo sur la vojo al vera esperanta kulturo, kaj ĝi estas inda, ke oni ĝin lernu preskaŭ parkere.”
Svenska Esperanto Tidningen.

De Tutmonda Perforto al Tutmonda Frateco. G. F. Wates. Tradukis el la angla lingvo W. Bailey, L.K. 120 paĝoj. Bindita 3ŝ. 6p.

“La verko estas grandvalora por pensemaj legantoj, kaj kvankam ni ne konsentas la argumentadon de la aŭtoro, ni multe, multe profitos konatiginte kun tiom da faktoj kaj ekzemploj ĉerpitaj el la historio, ke vere indas ĝin havigi al si.”
Sennacieca Revuo.

Gaja Leganto per Esperanto. P. E. Schwerin. 56 paĝoj. Broŝ. 1ŝ. 3p.

“Tiu libreto celas esti gaja helpilo al grupestroj kaj kursgvidantoj, amuza ekzercigilo por legantoj izolaj, kaj sendube ĝi atingos la celon. Pli bona tiaspeca helpilo certe ne ekzistas.”
Monda Revuo.

Infanoj kaj Patrinoj. D. C. Fisher. Tradukis T. J. Gueritte. La pensoj de moderna usona patrino. 175 paĝoj. Bindita 5 ŝil.

“Interesaj distingoj, klarigaj epizodoj, akraj rimarkoj, kaj kritika sento kaj harmonia traduko indigas la verkon por niaj atento, tralego kaj plezuro.”
Svenska Esperanto Tidningen.

Johano kaj Silvio. F. F. Betts. 48 paĝoj. Broŝ. 1 ŝil. Simpla legolibro por la komencanto.

“Tiu legolibreto speciale taŭgas por junaj lernantoj, kiuj povas trovi interesigon en la rakonto prezentanta serion da scenoj el la knabeta vivo.”
Franca Esperantisto.

Komercaj Leteroj. C. W. Pruissen. 64 paĝoj, broŝ. 2 ŝil. Komerca korespondo en Esperanto

Komuna Kantlibro. H. W. kaj N. Holmes. 64 paĝoj. Broŝ. 2 ŝil.

“Tre plaĉe prezentita, klare presita, kantaro kun plenaj muziknotoj (ankaŭ por piana akompano).”
Sennaciulo.

Londonanidoj. D. W. Munns. 98 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p.

“Brita knabo, 14-jara, priskribas la efikojn de la milito sur la urbaj lernejoj evakuitaj. Eble en tiuj paĝoj estas pli bone priskribita la brita karaktero ol en multaj dikaj libroj verkitaj de plenkreskuloj.”
Argentina Esperantisto.

Miniaturaj. Originalaj poemoj verkitaj de G. D. Nash. 58 paĝoj, bind. 1 ŝil.

“Ni devas konstati, ke S-ro Nash en siaj *Miniaturaj* donacis al Esperanta leganto miniaturopoemojn en tre alta speco de tiu ĉi verkadmaniero.” *Pola Esperantisto*.

Por Recenzo. Originale verkita de K. R. C. Sturmer. 61 paĝoj, bind. 1 ŝil.

“La verketo, kiu enhavas partojn majstre pentritajn estas leginda, kaj ni rekomendas ĝin.” *La Movado*.

Premiaj Romanetoj. Verkoj de konkursintoj. 96 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p.

“Pro la interesa enhavo kaj bona lingvo la libro tre taŭgas kiel ekzerca legaĵo por kluboj, studrondoj kaj perfektigaj kursoj.” *La Praktiko*.

Progresado kaj la Pasinteco. G. F. Wates. Tradukis W. Bailey, L.K. 154 paĝoj. Bindita 3ŝ. 6p.

“Entute ni rekomendas kun granda plezuro la verkon al ĉiu, kiu ŝatas interesajn librojn, kaj kiu samtempe deziras akiri ĝeneralan kaj grandampleksan perspektivon de la etika progresado de la homa vivbatalo.” *Flandra Esperantisto*.

Somera Universitato, 1948. 108 paĝoj. Broŝ. 4 ŝil.

“Ĉiu Malmö-kongresinto ĝojos povi legi la prelegojn tie ĝuitajn; al aliaj ni povas rekomendi la verkon kiel legajon tre havindan.” *The British Esperantist*.

Tejo kaj Ĉerik, kun aliaj rakontoj en simpla Esperanto. H. G. Toms: 48 paĝoj, broŝ. 1ŝ. 6p.

“Por tiu, kiu serĉas unuan legolibron la libreto estas nepre havinda, kaj kursgvidantoj profite ĝin utiligos por solvi unu grandan problemon sian.” *Esperanto Internacia*.

La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo. Charles Dickens. Tradukis M. C. Butler. 120 paĝoj en luksa eldono kun multaj ilustraĵoj. Bindita 6 ŝil.

“Laŭ ekstero, preso, papero, aranĝo, bindo, jes ĉio, la libro estas unu el la plej belaj esperantolibroj kiujn mi iam vidis.” *Svenska Esperanto Tidningen*.

Vivo de Zamenhof. Edmond Privat. 3-a eldono. Kun ilustraĵoj. 133 paĝoj. Bindita 5 ŝil.

“Ĝi estas viva, nuancoplena historio pri homo al kiu la homaro ŝuldas, ne nur unu el la plej rimarkindaj progresoj en la evoluo de la homaj interrilatoj, sed ankaŭ vere imitindan ekzemplon de homeca vivo.” *Nia Gazeto*.

La Vivo kaj Koncepto de la Societo de Amikoj. Kompilita de komitato de The Friends' Service Council. 64 paĝoj, broŝ. 1 ŝil.

“Taŭga fonto por ĉiu, kiu deziras ekkoni la kvakeran instruon.” *La Praktiko*.

LERNOLIBROJ

Esperanto por Infanoj. Verkis kaj faris la desegnaĵojn G. Gladstone Solomon. 69 paĝoj, broŝ. 1ŝ. 9p. 3-a eldono.

“Pro ĝiaj simpleco kaj facileco ni povas lokigi ĉi tiun libron ĉe la unua rango de niaj porinfanaj lernolibroj.” *Belga Esperantisto*.

The Esperanto Home Student. James Robbie. 15-a eldono. 64 paĝoj, 9p.

Malgranda lernolibro por anglalingvaj lernantoj.

First Steps in Esperanto. M. C. Butler. 24 paĝoj, broŝ. 6p.

Enkonduka lernolibro por anglalingvaj lernantoj.

Grammar and Commentary. G. J. Cox. 372 paĝoj. Bindita 7 ŝil. 6p.

4-a eldono. Gramatiko anglalingva por altgradaj lernantoj.

Mia Unua Esperanta Libro. Amy Waite. 2nd edition. 48 paĝoj, ilustrita, broŝ. 1 ŝil. 3p.

Infana lernolibro por anglalingvanoj.

Mia Dua Esperanta Libro. Amy Waite. 48 paĝoj, ilustrita broŝ. 1 ŝil.

Daŭriga libreto.

A Practical Course in Esperanto. D-ro F. Szilágyi. 7-a eldono. 100 paĝoj, broŝ. 2 ŝil. Kun klarigaj notoj en la angla lingvo.

“La sukceso de la kursmetodo de Szilágyi estas plu nekontraŭdirebla. La libro tion meritas pro sia amuza kaj facila karaktero.” *Lingvo-Libro*.

Curso práctico de Esperanto. D-ro F. Szilagyí. 100 paĝoj, broŝ. 2ŝ. 6p.

Eldono de la sama libro por hispanlingvanoj.

A School Esperanto Course. A. G. Batt. 68 paĝoj. Broŝ. 1 ŝil. 3p.

Anglalingva kurso por lernejanoj.

Step by Step in Esperanto. M. C. Butler. 7-a eldono. Bind. 7ŝ. 6d.

Lernolibro, detala kaj ampleksa, por anglalingvanoj.

VORTAROJ

Esperanta-Angla. E. A. Millidge. 5-a eldono. 490 paĝoj. Bind. 14 ŝil.

Inter la plej bonaj vortaroj nacilingvaj.

Angla-Esperanta. Fulcher and Long. 2-a eldono. 350 paĝoj. Bind. 13 ŝil.

La konata vortaro denove havebla.

LA LINGVO

The Language Problem and its Solution. E. D. Durrant. 168 paĝoj. Broŝ. 1 ŝil.

Plena informo pri la progreso de Esperanto (angla-lingve).

LA "EPOKO" LIBROJ

Romanoj taŭgaj por la distra horo, klare presitaj, kartone binditaj

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie. Trad. "Etulo." 188 paĝoj. 1 ŝil. 6p.

"Romano verkita per vigla kaj lerta stilo kaj tradukita per flua kaj facila lingvo." *L'Esperanto*.

2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** F. Molnar. Trad. L. Spierer. 188 paĝoj. 1 ŝil. 6p.

"Mi emas kredi, ke pro la eleganta, flua kaj facila stilo kaj spirretena interesplena enhavo mi tute forgesis pri mia rolo de recenzanto 'forglutante' la paĝojn." *Sennacieca Revuo*.

3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse. Trad. G. Badash. 188 paĝoj. 1 ŝil. 6p.

"Kiel distra legaĵo certe rekomendinda libro." *Flandra Katoliko*.

4. **La Tempo-Maŝino kaj Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells. Trad. E. W. Amos. 188 paĝoj. 1 ŝil. 6p.

"La enhavo de la volumo estas varia kaj pensiga, sekve leginda kaj rekomendinda." *Sennacieca Revuo*.

5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs. Trad. K. R. C. Sturmer. 190 paĝoj. 1 ŝil. 6p.

"La libro estas tre interesa kaj rekomendinda; la lingvaĵo estas bona." *Dansk Esperanto Blad*.

6. **Colomba.** Prosper Merimée. Trad. J. Beau. 188 paĝoj. 1 ŝil. 6p.

"La rakonto estas majstra, la traduko bonega, la prezeraroj tre malmultaj." *Nederlanda Esperantisto*.

7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlanyi. Trad. L. Spierer. 156 paĝoj. 3 ŝil.

"Altgrade rekomendinda aldonajo al nia literaturo, kiun devus posedi ĉiu humoramanta lernanto kaj lerninto de nia lingvo." *The British Esperantist*.


8. **La Virineto en Bluo** kaj aliaj rakontoj. Originale verkitaj de Mason Stuttard. 150 paĝoj. 3 ŝil.

"Interesa kaj amuza distra legaĵo kun simpla, preskaŭ klasika lingvo, kion oni volonte rekomendas." *Svenska Esperanto Tidningen*.

9. **Brulanta Sekreto** kaj aliaj rakontoj. Stefan Zweig. Trad. K. R. kaj P. E. Schwerin. Baldaŭ aperos.



La familia de los...



LEICESTER
CO-OPERATIVE
PRINTING
SOCIETY LTD.
CHURCH GATE
LEICESTER
KETTERING
AND LONDON